

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO- INSTITUTO

Nr 51 februaro 2004

Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio

Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758 (Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)

Rete: pistolii@email.com (Vasil Pistoli); selimib@albmail.com (Bardhyl Selimi); adoci@gmx.de (Artur Doçi) ; shhasani@albmail.com (Shaban Hasani); hamotto@aul.com.al (Martha Otto) ; beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ; matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi); sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti); dorian77@hotmail.com ; (mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); hysaerald@yahoo.it (Erald Hysa); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri); dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole); ervincanga@yahoo.com

Retpag'o : <http://www.esperantio.tk>

You can access the group's web features using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/>

You can access the group's Management page using the link below.

<http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage>

La enhavo de tiu c'i numero

Fremduloj pri Albanio kaj albanoj

Vojag'impresoj el la jaro 1928..

Patrino Tereza

UEA kaj Ni

Donaco de UEA kaj ties prezidanto

AIS kaj NI

La afero de AIS-filio en Albanio

BUS –sesioj en Pollando, Rumanio

ILEI kaj Ni

Forpasis Boo Mee

IPR enhavo

El la leteroj

Internaciaj renkontig'o

Marturisma internacia renkontig'o

Informoj de Asocio de Verdaj Esperantistoj

Novaj'oj de Henri Masson

Informoj el Heroldo Komunikas

Intervjuoj

Jacques Tuinder

Martha Heide Otto

Legaj'oj, humoraj'oj

Fabelo "Parabolo"

Trafa respondo

El la diplomlaboraj'oj de niaj gestudentoj

Turismeca nordokcidenta parto de Albanio

Fremduloj pri Albanio kaj albanoj

Vojag'impresoj pri Albanio

de Gaspard Marin

Noto: Lastatempe nia samideano s-ro Jacques Tuinder estas donacinta tre interesan libreton de Gaspard Morin, elstara esperantisto kiu antaŭ la Dua Mondmilito travojag'is mondon per sia biciklo. Li trapasis ankau' Albanion. Jen kelkaj vojak'impresoj liaj:

Albanio (jaro 1928)

Post dekunu horoj surmare ni els'ipig'is c'e la tagig'o, en la albanan haveneton de Sarande. La vilag'o kiu nombras 800 elog'antojn, konsistas precipe el tabulaj kabanoj lau'longe de la maro. Tuj post g'i staras montetaro perlogriza kalks'tono, c'efe parfumita per salvio kaj aliaj aromaj herboj.

La polico restigis min c'i tie tutan nokton dum ili telegrafe petis por mi de ilia estro Gjrokaster, la permeson dau'rigi mian vojak'on. Intertempe mi log'is en la Palaco de Piro (la Epira reg'o) c'ar tiel nomig'as la gastejeto de Sarande.

6 oktobro- Mi ekiris per ac'a vojo tra sovag'ejo de rokaj montoj, vepraj valoj kaj marc'aj fundoj. Nun granda tortiego trairis la vojon j'us antaŭ mia rado (mi ne scias kiu el ni du estis pli surprizita); tiam, c'eva;letoj kapriolas sur la apuda rokaj'o.

Kiel la transiro de la Alpara barilo, tiu de la Otranta markolo enkondukis subitan s'ang'on de sceno. Tion mi tuj sentis c'e mia trarajdo de Delvino, la unua urbeto renkontita survoje. Tie srtaris bazaro konsistanta el vicoj de budoj tute apertaj c'e la strata flanko- kaj ankau' masg'idoj kun ilia ronda minareto kies konusa pinto celas c'ielon.

La plimulto de la enlog'antoj estas islamanoj kaj portas fezon-la kamparanoj havas blankan senkvastan fezetan kaj la sinjoroj nigran fezon.

Post la transiro de alta montpasejo mi enprofundig'is en larg'an kulturitan valon. La vojo sekvis la bazon de la roka monto sur kies deklivo alkroc'ig'as multaj grekaj vilag'oj, unu post c'iu kilometro.

Mi finis la etapon en Gjrokster (greke: Argyrokastro), urbo konstruita sur tri promontoroj kiuj disbranc'ig'as de la monto.

Biciklo estas kuriozaj'o tie-c'i kaj altiras amason de scivolemuloj.

Kio ege frapis min estas la donacemeco de a popolo. Survoje pluvego devigis min s'irmig'i en la unuc'ambran dometon de maljuna kamparano apud Sofratik. La nlog'anto prezentis al mi kafon; poste , li ekbruligis sian pipon per c'akmako, siliko kaj tindro; kiam li vidis ke lia fajrigilo interesis min, li tuj donacis g'in al mi. En Gjrokaster fruktvendisto donacis al mi granaton kaj ses juglandojn; la pos'toficisto ne permesis al mi pagi

por pos'tmarkoj kiujn mi ac'etis; la urbestro proponis doni al mi monon por helpi min pri mia vojag'o; ec' knabo prezentis al mi duono da lek)=4 spesdekoj)!

Mia unua intenco estis min direkti suden al Janina, sed mi au'dis tie c'i ke la densa febro regas en tiu parto de Grekujo, kaj mortigas la popolon multpe. Tial, mi decidis sekvi la solan alian vojon al Ateno. Bedau'rinde ia ajn mapo estas netrovebla. Sed, ne grave; vojoj estas tiel malmultaj en Albanio ke estas malfacile konfuzi ilin kaj egale malfacile elekti ilin. Kelkaj sekcioj estas bicikleblaj sed aliaj tute ne.

Mia vojag'o dau'rigis tra sovag'a montaro.

Jen kelkaj punktoj lau' la vojo:

Tepelene, kiu okupas terason sur la krutaj'o de profunda valo. C'e la fundo mi transiras la riveron per pramo; la ponto sur kiu pas'is la vojo estis ruinigia dum la lasta milito, kiel c'iu ponto de la regiono.

Kelcyra, kun romantika ruino de kastelo, kronanta klifon c'e la eliro de roka gorg'o

Permet, kie mi pasigis sepulan nokton!

Leskovik, sida e alta montpasejo.

Post tio, mi malsupreniris en la kulturitan ebenaj'on de Koc'e, kie mi renkontis multajn rumanajn s'afistajn familiojn. Ili log'as en la apudaj montoj kaj potas apartan kostumon.

Estis en korc'e ke mi fine vidis malgrandan mapon de Balkanio, kaj tiel konstatis ke mi direktig'is tro norden kaj trovig'is apud la Jugoslavia limo..

La vojo de Florina al Biolj estis abomena- mi devis piediri parton de g'i pro la s'tonoj sed aliflake ekzistis fervojo. Mi do decidis uzi g'in por la reveno. La sola c'iutaga vagonaro ekiris c'e la tagig'o, sed c'ar s'ajnas, ke g'i ne havas precizan horon por ekiri, la pasag'eroj alvenis al la stacidomoj unu horon antau'e por cete trafi g'in. Longe ni tremis pro malvarmo sur la kajo.

Mezvoje , inter Bitolj kaj Florina bovaro decidis transiri la relojn kaj nia lokomotivo koliziis kun bovino: pasag'eroj elvagonig'is kaj tiris la mortintan beston de el la relvojo kaj la vagonaro reekveturis.

La stacidomo de Florina staras en la kamparo, je 6 km de la urbo. C'e mia alveno tie, la doganisto elvagonigis main biciklon por porti g'in al la doganejo, kaj la doganestro informis mi ke oni redonos g'in al mi kontrau' pago de 250 draĥmoj (proks. 30 spesmiloj).

Fine post longa interparolado pere de la apenau' komprebla franclingvo de la tradukisto, la biciklo estis liberigata , sed mi mem estis kondukita al Fremdula Kontrola Oficejo: tie onianoncis ke oni ne povas liberigi min antau' ol la oficestro estos vidinta mian pasporton. Nu bone, sed malfelic'e, la oficestro foriis al Saloniko kaj ne revenos antau' la morgau'a tago, je la deka matene. C'ar ne ekzistas dormejo apud la stacidomo oni fine permesis al mi iri al Florina por tranokti. Malfelic'e, dum tiu tempo mia biciklo, apenau' liberigita de la dogano, resaltis propravole en la vagonaron, kredante ke mi ankau' dau'rigis mian veturon. Kaj tial estis, ke mi devis piediri al urbo, scivolante c'u mi retrovos mian meh'anikan ojag'kunulo

La morgau'an matenon, kiam mi revens al la stacidomo, la pasportoficestro informis min ke mia greka vizo de Brindisi (por kiu mi pagis 4 spesmiljn) nur validis por unu sola eniro en la landon, kaj tiu eniro estis mia dua. Mi klarigis al li, ke mi ricevis specialan permeson de la Florina policestro kiu skribis sur la pasporto "valida por reveno". Vidinte ke mi kunportis monon li donis al mi permeson dau'rigi mian vojag'on Mi j'us havis tempon envagonig'oi por trovi mian biciklon, kiu atendis min en Sorovitse, lau' infoirmo ricevita de vagonaro oficisto. Tiel finig'is miaj turmentoj. Eble duono de ili estus eviteblaj..se mi nur komprenus la albanan, grekan kaj sudslavan lingvojn!—au' pli bone se Esperanto estus jam pli bone disvastigita en tiu parto de la Balkania babelturo. Kaim tio estos pasporton oni ne plu vidos ekster muzeoj de antikvaj'oj..

C'erpita de "Gaspard Morin vizitas sian hejmon- la mondon

Eldonita en Zagrebo 1974)

Beata Patrino Tereza el Kalkuto

Gonxhe Agnes Bojaxhiu (Gong'e Agnes Bojag'iu) naskig'is en Skopje (Makedonio) la 26-an de aŭgusto 1910 en albana familio. Pro la morto de patro, la patrino strebis ebligi al siaj tri infanoj felic'an infanag'on kaj pro tio s'I malfermis teksaj'vendejon. Gonxhe estis aktiva en la paroh'a vivo. Vokig'on servi al mizeruloj s'I eksentis kiel 12-jara knabino. Dum kelkaj postaj jaroj s'I ne plu pensis pri tio, sed kiel 19-ag'ulino s'I decidig'is forlasi la familian domon kaj ig'I monah'ino. S'ia unua stacio estis monah'ejo Loretto en Ratfaarham en Irlando, kien s'I venis en septembro 1928. Al Hindio s'I venis post du monatoj, kie en la monah'ejo en Darjeeling s'I noviculis. La unuajn vetojn s'I havis la 24-an de majo 1931 kaj definitivajn la 24-an de majo 1937. Dum kelkaj jaroj s'I instruis en lernejo en Bengalio.

La inviton fari ion pli por mizeruloj s'I ricevis dum la trajna voĵag'o de Kalkuto al Darjeeling, la 10-an de septembro 1946. Tio instigis s'in fondi novan kongregacion, kiu pli intense zorgos pri tiuj, kiuj havas nenion, kiuj estas forlasitaj de c'iu. S'ia peto servi ekster monah'ejo estis unue aprobita de la loka episkopo kaj la 8-an de aŭgusto 1948 s'ia peto estis akceptita en Romo. De tiam s'I vestis sin en simplan vestaj'on, tradician vestaj'on de la hindaj virinoj. S'ifondis lernejon por la malric'aj infanoj. Komence s'I havis kvin lernantojn, sed rapidela nombro de lernantoj kreskis en plej malric'aj urbaj kvartaloj. S'ian ekzemplon komencis sekvi kelkaj junulinoj, la unua estis s'ia eksa lernantino. Paralele kun la instruado, ili vizitadis malsanulojn. Plej superaj ekleziaj instancoj agnoskis novan kongregacion "Misiistinoj de la Karitato" la 7-an de oktobro 1950. Krom la kutimaj tri votoj de la monah'a vivo, la misiistinoj havas ankau' la kvaran : servado al mizeruloj plenkore sen rekompenco.

La misiistinoj festas en la 10-an de septembro "Tagon de la Dia Voko", memorante la tagon de la jaro 1946.

Sekvis fondo de la hejmo por la mortantoj "Loko de Pura Koro" kaj pli da hejmoj por mizeruloj, forlasitaj kaj malsanaj infanoj. La misiistinoj helpas al c'iu, kiuj bezonas helpon, senkonsidere de nacio kaj religio.

La unua misiista hejmo eksterhinda estis fondita en Venezuelo en la jaro 1965. Sekvis pliaj eb'roj kaj Afriko. En okdekaj jaroj de la pasinta jarcento la misiistinoj jam servis en la tuta mondo.

Pro sia agado por la plej mizaraj Patrino Tereza ricevis Nobelpremion por la paco en la jaro 1979. En la sama jaro la kongregacio havis jam 158 filiojn tra la mondo kaj komencis malfermi siajn domojn en komunismaj landoj. La unua estis fondita en Zagrebo kaj la dua en orienta Berlino. Malgrau' multaj streboj, la misiistinoj ne sukcesis fondi sian filion en C'inio.

Voĵag'ante tra la mondo, Patrino Tereza renkontis plurajn gravajn kaj respondecajn personojn, kiujn s'I impresis per sia obstino kiel porparolantino de la tutmonda mizerularo. En oktobro 1985 s'I parolis okaze de 40-a datreveno de la Unuig'intaj Nacioj.

En la jaro 1997 al la kongregacio apartenis c'. 4000 monah'inoj en 600 domoj en 123 landoj de la mondo. S'I iniciatis ankau' fondon de la vira kongregacio de la misiistoj, al kiu en la jaro 1997 apartenis c'. 400 monah'o, 15 pastroj kaj 35 kandidatoj.

Post strec'a jaro de voĵag'o, la 5-an de septembro 1997 Patrino Tereza mortis en kalkuto. S'ia korpo estis entombigita la 13-an de septembro kun plej altaj s'tataj honorigoj.

La 23-an de oktobro 1997, la c'efepiskopo de kalkuto direktis leteron al la Pontifika Konsilio por Beat-kaj sankt-Proklamoj kun la peto pri rajtigo komenci la ekzamenadon, neatendante lau' reguloj kvin jarojn post s'ia morto. Oficiale la proceso komencis la 26-an de septembro en kalkuto. La proceso finig'is en aŭgusto 2001. La dokumentaro konsistis el 80 kolektaj'oj, c'iu kun 450 pag'oj. La solenan proklamon de s'iaj heroecaj virtoj kaj dekretan pri la miraklo, okazinta pro s'ia propeto c'eestis la 20-an de decembro 2002 la papo.

Papo Hohano Pau'o la Dua beatproklamis s'in la 19-an de oktobro 2003, dum la dimanc'o, kiun oni en la tuta mondo celebraskiel misiistan dimanc'on. C'I okazaj'o estis la centra parto de la celebrado de la 25-jara jubileo de pontifikado de johano Pau'lo la Dua

Marija Belosevic

(C'erpita el Dia BENU, gazeto de IKUE, jaro 2003, nr 4 (52))

Noto de la redaktoro: Patrino Tereza venis unafaje Albanio en la jaro 1990 kiam la komunsima diktaturo malfortig'is kaj fine falis. S'iaj fratinoj vivis tutan vivon en la urbo de Shkoder (Norda Albanio). En Albanio Patrino tereza fondis almenau' kvar domojn.

Intervjuoj

- Lastatempe ni intervjuis s-ron Jacques Tuinder, malnova amiko kaj subtenanto de nia E- movado. Jen g'i:

Demando: Saluton, amiko Jacques, vi estas jam konata c'e ni pro la agado de via fondaj'o Evidente ankaŭ en Albanio. Kiel progresas tiu fondaj'o?

Respondo: La nombro de la projektoj de fondaj'o EVIDENTE nur kreskas kaj kreskas post mia pensiig'o en la jaro 1994. La bezonoj estas multaj kaj grandaj, sed mankas helpantaj manoj kaj fondusoj por realigi c'ion kion mi fakte dezirus realigi. Cetere c'io dependas de la sanstato de mia edzino Vera kaj mi, kiu nune estas bona sed morgau' povos ig'o mala.

D: Kion vi planas por la kuranta jaro?

R: Por 2004 ni deziras pliampleksigi la hejmon de blindja infanoj en Chunnakam (Srilanko) kaj helpi al Moldavio al la renovigo de etag'domo por familioj kun unu au' pluraj membroj vidhandikapitaj. Ni ankaŭ klopodas finance ebligi, ke du denaske blindaj infanoj en Maroko frekventu specialan lernejon en sia lando. Laste nia intenco estas konstrui lernejon por fakinstruo al studentoj blindaj kaj malforte vidantaj en Tajlando. En Albanio nin ne atingis speciala helpopeto, sed eble ni ricevos inviton instali optikejon en la norda parto de Albanio (regiono Shkoder).

D: Kiom mi scias vi helpis notinde ankaŭ al malliberuloj..C'u?

R: Nia fondaj'o klopodas helpi al la plej malric'aj de la malric'aj; ilin ni trovas unualoke en hejmoj, institutoj, orfejoj, blindulejoj, sed ankaŭ en hospitaloj kaj prizonoj. C'ar mi mem profesie laboris en klinikoj kaj malliberejoj, mi persone tre s'atas eniri tiujn "inferojn" por servi al gefratoj tieaj kun vidproblemoj. Pro tio ke ni dufoje estis en moldovaj prizonoj , ni povas iom jug'i pri la kompatindaj cirkonstancoj en kiuj devas vivi homoj, kelkfoje tute senkulpa. Tio estas la kialo ke mi alvokis ekleziajn komunumojn en mia regiono oferti al prizonuloj en Moldavio kristnaskan mang'on. Kio okazis (por la dua fojo). Mia opinio multaj el niaj aktivaj'oj okaza slau' la spirito de d-ro Zamenhov, kiu enblovis en sian lingvon tre varman "animon", t.e. la interna ideo. Sen patoso: kial ne almenau' iom (minimumon) fari por humanigi nian teron kaj interfratigi la homojn? Dum miaj vizitoj al homoj en kaptiteco mi spertas senton de solidareco kaj same ke pravis d-ro Zamenhov: neutrala lingvo kaj komunhoma etiko povas konsiderinde s'ang'i la mienon de nia tero . Por mi vivi sen (naiva?) utopio estus neeble!

D: Vi same propagandas kaj uzadas Esperanton kiel komuniklingvon, c'u sukcese?

R: C'ie kie mi agadas por homoj kun vidproblemoj – ofte nenecesaj c'ar eviteblaj au' kuraceblaj – min asistas gehelpantoj parolantaj la internacian lingvon. Por mi estas dau'ra turmento renkonti homojn kun kiuj kontakto neblas c'ar ili ne faris la penon lerni la simplan lingvon de d-ro Esperanto. Nune mi estas preparanta mision kun du optikistoj al Tag'ikio , kaj denove granda parto de la korespondo okazas en esperanto. La prezidanto de la tag'ikia Esperanto –Asocio eksplicite invitis min konatig'i kun la tieaj gesamideanoj. Kaj mi , kompreneble, ambau'mane akceptis tiun inviton!.

Por bona kompreno: mi ne aparte propagandas Esperanton dum miaj vojaĝ'oj; mi simple uzas kaj montras ke g'i funkcias , ankaŭ g'ia interna ideo. Oftege mi diras: kiom mi bedau'ras ke mi ne povas paroli kun vi, kvankam tiu problemo estas facilege solvebla!

D: Vin estas honoriginta la reg'ino de Nederlando pro via noblaj faroj eksterlande. C'u ankaŭ la organoj de nia tutmonda E-movado?

R: Se reg'ino au' organizaj'oj honoras nian bataladon kontraŭ evitebla vidhandikapeco per medaloj kaj dokumentoj kaj paroladoj, mi komprenas tion kiel dankesprimig'on al c'iuuj kiuj provizas min per kromaj manoj kaj piedoj. Mi faras mian laboron kun grandega plezuro kaj g'i neniel

signifas sinoferadon, au' ion tian. S'erce mi foje diras : lernu Esperanton kaj aktivu kiel diligenta kolego-esperantisto, se vi s'atus farig'i kavaliro de S'ia Reg'ina Mos'to!

D:Kion vi opinias pri la disvastig'o de Esperanto aktuale en la mondo?

R: En pluraj landoj la Esperanto-movado stagnas; tion mi konsideras katastrofa evoluo. Sed s'ang'ig'as tempoj. Mi estas certa ke fruemalfrue la homaro komprenos la nemalhaveblan valoron de komuna neutrala lingvo, kiun ni jamj c'utage efike kaj g'o'jige praktikas. Nu, al albanaj kaj nederlandaj gesamideanoj mi konsilas: laboru por nia ideo kaj ligu kun Esperanto pozitive humanan ideon, ekz. Esperantistoj estas homoj kiuj mondvaste helpas al blinduloj, lepruloj, tratinfanoj, ktp Kun elkoraj salutoj kaj sincera danko por publikigo en via organo, amike via Jacques.

Bardhyl Selimi

- **Intervjuo kun s-ino Martha Heide Otto**

Kvankam estas kvazau senkurentaj kondiĉoj en Vloro, mi klopodas respondi al viaj demandoj pri mia vojaĝo al Kambogho kaj Vjetnamio en 1992-94.

Tien mi vojaĝhis kiel voluntulo Baha'i, ĉar en 92 oni komencis el Tajlando resendi la tien rifughintajn Kmerojn al ilia hejmlando, kie preparis ĝeneralajn elektojn UNTAC, speciala ordiga grupo de Unuighintaj Nacioj. El la landlimo en Tajlando mi venis al Phnom Penh, unue loĝhis en la modesta Bahaa Centro (restoracio de Malajzianoj kun kelkaj chambroj), kaj poste travojaĝhis la landon kun amikoj au sola por retrovi kaj rekontakti la diversajn bahaanojn kaj helpi ilin iomete. La rughkmeroj tiam kausis sufiĉe da malfacilajhoj. Ekzemple unu vojaĝhon mi memoras en malnovega autobuseto de la kapitalo al Kampot: la ŝoforo estis haltigita 11 fojojn far armitaj junuloj kaj disdonis monon, cigaredojn au iu pakajho.

En Phnom Penh mi instruis la anglan al monahoj en iu Budhisma templo (wat), kaj iu tago, biciklante hejmen, mi preterpasis verdan barilon kun 'ESPERANTO' skribite sur ghi. Mi tuj haltis, eniris, pridemandis kaj renkontis kun Chhim Sokha, aktiva Esperantisto, kiu invitis min viziti sian E-o kurson. Tion mi faris refoje kiam mi estis en Phnom Penh kun granda ghojo. Ankau en gazeto mi trovis artikolon pri Esperanto. (se vi deziras mi povos montri ĝhin al vi kune kun fotoj). Mi revidis Chhim Sokha dum la 94 UK en Seulo, sed poste iam perdis kontakton kun li. Li laste aperis en la jarlibro de 2000, mi jhus vidis, eble li ne pli obtenas subtenon kaj ne povas daurigi la E-o laboron. Mi bone memoras kiel felicha li estis pro donaco de skribmashino.

Ege frapis min la diferenco inter la mildaj, afablaj Kmeroj kaj ilia terura, sangoplena historio. Post studi ĝhin, mi komprenis kiel la tiamaj ideoj de Karl Marx kaj Friedrich Engels infektis la mensojn de multaj homoj, kiel ankau de Pol Pot. Ili diris: post feudalismo venis kapitalismo, kaj post kapitalismo venos komunismo. Por detruo la kapitalismon, oni devas forigi la kapitalon; kaj por forigi la kapitalon, oni devas detruo la familion. Kaj tion li faris, detruis bankojn, lernejojn, preghejojn kaj templojn, sendinte milojn da homoj el la urboj al kampoj, por tie labori kiel sklavoj, samtempe murdinte pli ol du milionojn da Kmeroj. Fakte mi ne renkontis iu ajn Kamboghanon, kiu ne perdis iu ajn membron de sia familio dum tiu frenezo.

Kanadaj amikoj petis min nepre veni al Vjetnamio en 94, kie ĉiuj volas lerni la anglan. Krom senpagaj seminarioj pri 'Kuraghiga Trejnado', precipe kun psikologoj sed ankau en multaj diversaj fakultatoj kaj institucioj, mi gajnis monon pere de instruado de la angla al aferistoj, eks-vjetkongoj, sportistoj kaj en diversaj universitatoj en Hanoi. Tie mi serĉhis kaj trovis Esperantistojn, ech turisman agentejon uzante Esperanton. Mi ne plu memoras, kiu montris iomete la urbon al mi, sed anku lin kaj diversajn amikojn mi revidis dum UKoj. La Vjetnamanoj forte impresis min pro ilia laboremo, lernemo kaj legemo - ech bazara vendistino legis libron.

Vi demandis min pri similon kaj diferencon inter tiuj du popoloj kaj albanoj.

Simile estas, ke la tri landoj estas evoluantaj post komunisma sperto, kiu certe havis pozitivajn aspektojn (ankau mi multe admiras 'Onklo Ho!'), sed la mortigo de Dio kauzis la perdon de multaj homaj kaj spiritaĵaj valoroj, kiuj en Vjetnamio oni klopodas retrovi precipe en Konfuciaj tradicioj, en Kambogho en Budhismaj reguloj, dum en Albanio ekzistas mirinda religia toleremo. Multaj religiaj grupoj envenis la landon, kaj albanoj havas la nefacilan taskon elekti kion estas la plej tauga vojo al la estonteco. Tamen, refoje mirigas kaj chagrenigas min la agresema, detruema potenco de kelkaj albanoj, kiuj sence ech detruas novajn bushaltejojn!

Ni chiuj scias pri la doloriga, seniluziiganta historio de Albanio. Mi forte esperas, ke albanoj retrovos kaj reaplikos iliajn bonajn tradiciojn, kiel 'besa' ekzemple, refieros pri ilia lando, kaj kun menso, korpo kaj koro helpas rekonstrui ghin kiel ghi povos esti: paradizo por chiuj albanoj! Mi kutimas diri, kiam Albanio funkcias kiel europa lando, tiam la albanoj estos akceptataj kiel europanoj. Por mi la tero estas nur unu lando kaj chiuj homoj ghies civitanoj.

Chu mi longe restos en Albanio? Mi tute ne scias. Mi amas la landon kaj la albanojn, kaj mi restos ghis kiam mi estas bonvena kaj utila por helpi iomete en la kampo de socia, demokrata kaj spirita edukado. Tamen, kiam mi estas 2-3 tagojn sen kurento, elcherpighis la gashejtilo kaj neniu portas novan botelon al mi al la 9a etagho (kiel nuntage), mi kutimas konsoli min pensante: venonte mi iros al Hawaii!

Kiel diris Patrino Tereza: la vivo estas defio, akceptu ghin!

Espereble mi respondis al chiuj viaj demandoj kaj dankas vin pro la intervjuo (bv. korekti eventualajn erarojn).

Kun elkoraj salutoj

Martha

Heide Martha Otto K.P. 4311 Vlora

Noto: lastatempe s-ino Martha estas sendinta paralelan leteron en la angla lau' kiu oni ekscias ke s'i translokig'os baladau' al israelio. Ni gratulas s'in kaj samtempe beda'ras c'ar s'i estis tuttempe bonega nia kunlaboranto. Jen la teksto de la letero:

From: Heide Martha Otto [hamotto@aul.com.al]

Sent: Sunday, February 01, 2004 7:33 PM

To: Payam Elham Payman

Cc: Roya Parnian; Feizi Rafat; Bardhyl Selimi; Diana Subashi; Matty Thimm; Hans-Juergen Thimm; Carmel Mallia; Dr. Susanne Schaup; Ela Deneku; Elda & Jalal Dede; Frieder Otto; Holger & Joyce Siebers; irena mahmoodi; Jo Harding; Sarah & Emanuel Cassar; Vjollca & Hushang Anvari; Jutta Strieth; Athina Basha; Hasan Shodiev; Enver Roshi; Ilir Zyfi; Matthias Ehrlich; Neven & Sonja Mrzlecki; Rose Marie & Iradj Sabet; Suela Q

Subject: Haifa

Dear Friends,

I have just received a call from Haifa: the Universal House of Justice has accepted me for service at the World Centre commencing May 2004 for a period of 30 months. Just wanted to let you know that I plan to leave Albania around the middle of March to visit my children in GB and D and leave my car there.

As you know I have been quite happy in Albania - most of the time, anyway. But when I was in England last summer, one of my favorite sons, Adrian, insisted on my applying for service at the World Centre, saying that I had suffered enough in AL. Reluctantly I finally complied, was tested and checked and examined on all levels and felt quite detached - fine if I can go, fine if I stay and travel to Asia this year (Esperanto Congress and several invitations). But now that I have been

accepted I feel very thrilled at this new and extremely important phase in my life. Of course I will return to Albania, this is my home now, and I hope to make myself a bit useful here in the future.

With loving Baha'i greetings to you all
Martha

ILEI kaj NI

- **Forpaso de Kim Boo Mee**

Karaj:

Kiel vi certe estas jam informitaj, nia Kasisto Boo Mee KIM-LINDBLOM forpasis antaw 2 semajnoj. Sxi kaj mi devus prezenti okaze de la baldaw okazonta ILEI-Estrarkunsido (6-7/12/03) statistikon pri la membroj en 2003 cele al difino de la nombro de komitatanoj, kiujn cxiu aparta Sekcio rajtas havi por la sekva komitata periodo. Mi scias, ke vi cxiuj akurate sendis al sxi membroliston cxijare, sed bedawrinde mi ne havas tiun materialon kun mi. Bv esti afablaj kaj rete sendi al mi la liston de membroj en 2003 en via Sekcio. Mi tre aprezos, se la listo atingas min plej malfrue en mardo la 2-an de decembro. Mi tre petas pardonon pro la gxeno, sed vi certe povas kompreni, ke malgraw cxi tiu cxagreniga neantawviditajxo, ni devas plu antawenigi la laboron de nia Ligo. Anticipan dankon pro via kunlaboremo. **Atilio ORELLANA ROJAS** **ILEI-Sekretario**

- **La enhavo de IPR**

Jen la enhavo de la nun presata numero de la Internacia Pegagogia Revuo. 2004/1:

Stefan MACGILL: Plumira 1

La Estraro kunsidis en Beogrado, La Komitato vocxdonas (A. ORELLANA ROJAS)

Katja IGNATIEVA: Interkultura lernado kaj edukado: bezono kaj defio 4

Forpasis BOOME (anstataux nekrologo) 11

Hokan LUNDBERG: Flugiloj de Malfacila Vento 13

Bardhyl SELIMI: La distra momento dum la lecionhoro de matematiko (I-a p.)

LIU Xiaojun: Kiel mi instruas tempojn kaj participojn al cxinoj (I-a parto)

PETIK János: Pri la instruo de vortoparoj 28

Katja BODNAROVA: Cxe la tombo de Komenio 30

El la landoj kaj sekcioj (GB, BG, JP, TG) 31

Reago (Felix GARCIA BLAZQUEZ) 33

Konferenco 2004 - informoj, aligxilo (Atilio ORELLANA ROJAS) 33

Informoj de Asocio de verdaj Esperantistoj

Karaj geamikoj,

eble kelkaj el vi ankaux havis malfacilajxojn legi mian lastan urgxan inviton partopreni la Euxropan Kongreson de la Verdaj Partioj. Do, mi ripetas - sen kromaj indikoj: 2004-02-20/22 Romo (IT), Auditorium Parco Della Musica, Viale Pietro De Coubertin. Samtempe ni festos la 20an Jarigxon

de AVE. Cxar gxis nun nur Rinaldo kaj Giorgio jesis, ke ili venos, almenaŭ sabate; kaj krome cxar la salonoj estas limigitaj, ne okazos aparta publika kunsido de AVE. Kaj gxis nun ne certas, cxu ni povas havi informstandon - mi kunportos faldfoliojn pri Esperanto kaj pri AVE. De la oficialaj Verdaj Delegitoj almenaŭ tiu de Makedonio parolas E-on. Mi gxojas se pluraj el ni sukcesos partopreni - mi povas sendi al vi aligxilojn (por la hotelo (div.) kaj kongreso (80 EUR por la tuta kongreso, inkluzive la mangxoj) Cxiukaze mi gxojos se VI venos. Bedauxrinde AVE preskaŭ ne povas finance subteni vin.

----Ni tradukis la manifeston de la Verdaj Partioj okaze de la Balotokampanjo al la Euxropa Parlamento. Gxi trovigxas sur nia TTT-ejo. Sed mi povas sendi gxin ankaŭ papere. Mi kunsendos gxin per Aveno 27 - preta gxis Romo.

Cxion Bonan por Vi

Amike salutas Manfred Westermayer

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) - sekretario

Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen

2003-10-20 (Aveno27 n.k.): www.comlink.apc.org/ave/welcome.htm

:) Mi preferas simplan tekston "cx...ux" aux RTF-formaton

Novaj'oj de Henri Masson

La franca-germana TV-kanalo ARTE elsendos la filmon "La Diktatoro" de Charlie Chaplin en restaurita versio la lundon 22an de decembro. Jen okazo por rememorigi, ke la butikshildoj de la geto, en tiu filmo de la 1940, aperis en Esperanto, kaj ke la belega parolado de Charlie Chaplin fine de tiu filmo, plej bone spegulas la idealon al kiu D-ro Zamenhoh. Indas memori ke jam en 1922, en parolado en Muniko, Hitler publike mallaudegis Esperanton kaj same kondamnis ghin en "Mein Kampf" (1925-1927) kiel lingvon de la judaro por servutigi la ceterajn popolojn. Interesa rezonado de demenca mensmalsanulo, kiam oni pensas ke Zamenhof mem jene rifuzis partopreni en la unua kongreso de la Tutmonda Esperantista Hebrea Asocio, en 1914, en Parizo : "Mi mem bedaurinde devas stari flanke de la afero, char lau miaj konvinkoj, mi estas "homarano", kaj ne povas ligi min kun la celado kaj idealoj de speciala gento au religio. Mi estas profunde konvinkita, ke chiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfelichon, kaj ke la celado de chiu homoj devus esti : krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj -- kiel nature sindefenda ago -- estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj ; sed, se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta ; ambau naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfelichoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se chiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos starighi sur grundo tute neutrala. Tio estas la kauzo, pro kiu mi, malgrau la korshirantaj suferoj de mia gento, ne volas ligi min kun hebrea nacionalismo, sed mi volas labori nur por interhoma justeco absoluta. Mi estas profunde konvinkita, ke per tio mi alportos al mia malfelicha gento multe pli da bono, ol per celado nacionalisma ..." Cetere, jam de pli ol unu jaro, mi jam petis tradukon au version de tiu parolado en la angla kaj Esperanto, sed, ghis nun, neniu havigis ghin al mi .

Esperanto kaj Linukso

Grava laboro efektiviĝis, grandparte en la ombro, same kiel por Esperanto, ĉirkau Linukso (Linux). Estas ghojige, ke esperantoparolantoj partoprenis ankaŭ en tio. Dankon al ili ! Nun montrighas, ke Linukso farighis ne nur matura komputila registemo, sed ankaŭ ke ghi farighis uzebla, eĉ por ordinaraj homoj sen speciala kompetenteco pri informadiko au programado. Linukso estas multplatforma registemo kiu funkcias same bone sur komputilo PC kiel Macintosh au aliaj materialoj. En la nuna fazo, mankas nur malmulte por ke Linukso estu plene alirebla tutmonde per Esperanto. Multaj elementoj el ghi jam ekzistas en Esperanto, tamen, bezonataj estas ankoraŭ tradukoj de la angla au de la franca al Esperanto por ke la Esperanto-komunumo povu partopreni en ghia tutmonda disvastigo, kun speciala atento al la tria mondo. Kiuj havas kompetentecon kaj en Linukso kaj Esperanto, tiuj bonvolu rilati kun Olivier Archer <olivier.archer@infini.fr> <<mailto:olivier.archer@infini.fr>> por proponi sian kunlaboron kaj helpon, i.a. por tradukoj, lingva kontrolo, ktp. Bv noti, ke li estas spertulo pri Linukso sed ne ankoraŭ pri Esperanto, kiun li eklernas de malmulte da tempo; sekve li legas kun sufiche bona kompreno sed ne ankoraŭ plene esprimighas en la Internacia Lingvo. En Esperanto pri Linukso ekzistas nun diskultisto : <http://lists.debian.org/debian-esperanto/> <<http://lists.debian.org/debian-esperanto/>>

Informoj pri Debian (Debian estas versio de Linukso, kiu karakterizighas per grandega stabileco dum Mandrake privileĝias ĉefe la uzfacilecon, RedHat estas versio por la entreprenoj...) en Esperanto ĉe : <http://www.debian.org/index.eo.html>
<http://www.debian.org/index.eo.html>

UEA kaj Ni

Donaco de UEA

Hello,

I've added you to my albanaj-esperantistoj group at Yahoo! Groups, a free, easy-to-use email group service. As a member of this group, you may send messages to the entire group using just one email address: albanaj-esperantistoj@yahoogroups.com. Yahoo! Groups also makes it easy to store photos and files, coordinate events, and more. Here's a description of the group:

Diskut-listo por parolantoj de la internacia lingvo Esperanto en Albanujo Here's my introductory message for you bonvenon al la listo por albanaj esperantistoj donacita de mi, renato, al vi, Bardhyl!

Amike Renato

Renato12002 has changed your membership status for the group albanaj-esperantistoj from Member to Moderator. As a group moderator, you can change delivery and posting settings for individual members. In addition, you may have been granted additional privileges by Renato12002. You can access the group's web features using the link below. <http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/> You can access the group's Management page using the link below. <http://groups.yahoo.com/group/albanaj-esperantistoj/manage> Complete your Yahoo! Groups account: Your email address has been added to the email list of a Yahoo! Group. To gain access to all of your group's web features (previous messages, photos, files, calendar, etc.) and easier control of your messages delivery options, we highly recommend that you complete your account by connecting your email address to Yahoo account. It is easy and free. Please visit: <http://groups.yahoo.com/convacct?email=selimib@albmail.com&list=albanaj-esperantistoj>
Yahoo! Groups

KOTIZ-TABELO

2004

por

Albanio:

MG	-							5				EUR
MJ	-							11				EUR
MA		kaj				MA(T)				-	27	EUR
DMJ	-							275				EUR
DM	-							675				EUR

* Klarigoj

MG - Individua membro, kiu ricevas nur la Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ - Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron

MA - Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron kaj la revuon Esperanto

MA(T) - Individua membro sub 30 jaroj, kiu ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto kaj revuojn de TEJO

DMJ - Dumviva membro, kiu ricevas dumvive la Jarlibron

DM - Dumviva membro, kiu ricevas dumvive la Jarlibron kaj la revuon Esperanto

Char en via lando ne estas UEA-peranto, vi estas invitata pagi rekte al UEA al unu el la kontoj:

ABN-Amro Bank, Postbus 949, 3000 DD Rotterdam (konto: 42.60.51.599) (aldonante 7 eurojn).

 Banko MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto: 25.52.89.804)

 per poshtmandato al Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo.

 per cheko favore al UEA (aldonante 10 eurojn por la bankkostoj).

 per kreditkardoj: Visa, Amex, Mastercard, JCB, Access, Carte Bleue

 al la poshtchekkonto de UEA en:

Belgio										000-1631831-97
Germanio	3182	91	509	BLZ	370	100	50			Koln
Svedio										74374-0
Svislando					12-2310-0					Bulle

Internaciaj renkontig'oj

Marturisma internacia renkontig'o

Lau' informoj de Kroata Esperantista Junularo, oni okazigos en Pula, Kroatio internacian marturisman renkontig'on ekde 1-6.4.2004. Por la programo kaj akomodig'o oni devas pagi (por Albanio) 100-110 eu'roj). Antau'pago estas 10 eu'roj. Por kromaj ekskursoj estos krompagoj. La interesuloj sin turni rekte al Kroatia Esperanto-Junularo Asocio, Knjeza Mislava 11, 10000 Zagreb Kroatio- Hrvatska, tel ++385 91 588 38 32 kaj ==385 98 941 42 33. rete: keja.kroatio@yahoo.com

El la leteroj..

- Estimata samideano, Mi tre dankas la alsendon de la Bulteno de la Albana Esperanto-Instituto. Interesa enhavo, bonstila lingvo. Kun bonaj salutoj,

Baldur Ragnarsson, Reykjavik.

- Përshendetje nga Kaçaniku,më intereson metoda mbi mësimin Esperanto si dhe lidhur me bazën që e ka.

Va Lony

- **Letero de Agnes Geelen**

antaux kelkaj semajnoj,mi sendis mesagxon kiun mi nun parte kopias: respondi vian demandon:'cxu dauxre validas via propono pri kunlaboro' estis unu el la aferoj 'tuj' farendaj.la respondo estas:jes! la celo de 'lernejoj por evoluo' estas helpi lernejojn, kie oni ankaux instruas esperanton, en ekonomie malfortaj landoj. tiu helpo unuflanke iru al subteno de la esperanto instruado mem,aliflanke nia ambicio estas povi subteni materiajn bezonojn de la lernejo/de certaj lernejanjoj. mi nun sxatus scii kion ni povus fari por lernejo albana.komence nia helpo estos suficxe modesta cxar kaj la projekto kaj la mononsumojn kiujn ni sukcesos kolekti devos kreski ankoraux. por ke ni havu pli da mono,mi demandas vian helpon;cxu vi volus verki skizon,mallongan sed laueble vivecan pri la koncerna lernejo,pri la cxiutaga vivo en la lernejo, pri la vivkondicxoj de la lernantoj,pri la laboroj de la (esperanto) instruistoj.se eblas,aldonu foto(j)n. tiun skizon ni disvastigos:plej bonajn financajn rezultojn ni atingas se ni povas prezenti al la homoj tiajn konkretajn informojn. cxu jam ion vi povas rakonti?

amike, **Agnes**

- **Letero de Trevor Steele**

Elkoran dankon pro viaj afablaj vortoj. Mi venis al la CO en aparte malfacila periodo, sed mi esperas, ke ekde nun la situacio estos pli glata. Cetere, dokumentoj el c'iuaj etapo de la historio de UEA pensigas min, ke C'IAM estis sufic'e gravaj problemoj en la asocio, kaj sendube estos. Mi supozas, ke same pri c'iuaj organizoj, en kiuj agas homoj... Partoj de la laboro tie c'i estas ja agrablaj kaj fruktodonaj: speciale la individua kontakto kun tiom da sinceraj, laboremaj homoj en tiom da landoj. Sed por mi persone la rutina atento al miloj da etaj detaloj, kiu estas tute autentata parto de burokrata laboro, estas fremda kaj

limiga. Kvankam unu parto de mia cerbo agnoskas, ke protokoloj, regularoj, bug'etoj, raportoj de komisionoj, ktp. estas gravaj, alia parto de mi vidas en ili amason da seka, senviva papero... Malbona ekirpunkto por direktoro! Mi sopiras al verkado (kion mi ne sukcesas fari tie c'i) kaj la sukoplana vivo de vera literaturo, for de la c'iutagaj kvereletoj kaj polemikoj de la movado. C'iukaze mi dankas vin. Mi ne multon skribas pri mia estonta kariero, sed g'i fakte ekscitas min, do mia demisio ne estas nur foriro, sed ALIRO al io pli bona, almenau por mi. Mi dankas ankau pro via helpo dum mia tempo tie c'i. Lasta demando: c'u la organiza demando en Albanio estas solvita?

Kore, **Trevor**

- **Letero de Alicja Quednau al s-ro Corsetti**

Estimata Sinjoro Prezidanto de UEA

Prof d-ro Renatto Corsetti- Kara samideano.

Mi tre dankas al vi pro via amika letero.1/ Post la partoprenado en agado organizita de Sinjoro Pagano en Brukselo (koran dsankon pro invito) - oni povas fiere konstati : La unuan fojon en la historio de E-to-movado kaj historio de EU kaj EU- Parlamento eksonis la esperanto-lingvo dum oficialaj kunvenoj kaj en Europa Parlamento mem. Por ne konantaj aliajn lingvojn kaj ecx simpatiuoj iris tre bone farita e-to tradukado. Estis elektitaj reprezentantoj de cxiuj landoj por plu agi Cxeestis vere cent esperantistoj de diversaj landoj. Al granda simpatiuo de esperanto G. Pagano kaj favora esperantisto Clerici-ecx ano de AIS ka ERP

oni devas danki pro provo de iniciato kaj gratuli. Pensante pri estonta venko, bone estus, ke okazos pli forta kunigo kun esperanta movado. Cxiam estas necesa kunigado en estonteco -simile kiel en pasinteco oni informu pri agado, provoj ecx se ili ne plene estis sukcesaj. Homoj devas koni la historion de Europo kaj historion de esperanta movado. Oni ankau devas koni historie gravajn faktojn el pasinteco (j. 1920).

2/ Mi signalis pri alia afero. eble ecx kun duboj. Fakte- la afero pri kiu mi iomete timas (se mi bone komprenis informojn menciitajn en E-cxehaj jxurnaloj kaj en Ondo) temas pri alvoko al marsxoj cxu kunmarsxoj (precize oni diru demonstracioj) -unue al Palaco de Nacioj en Genevo (decembro 2003-la 6-an) kaj due en Stuttgart.(majo 2004) Mi ne estas kontrauxulo de bonaj ideoj, ne neas, Miaj obstakloj venas de tio, ke mi scias ke oni ne povas organizi (cxiam estas devigaj almenaux oficialaj sciigoj- precipe nun- en periodode granda maltrankvilo, iuajn marsxoj sen ricevi oficialajn aprobojn de lokaj sekurinstancoj- oni diru permeson aux sekurgarantiojn) konkrete - lauxlegxe oni bezonas : a/ permeson kaj sekuron de polico por demonstrantoj b/ esti certa ke tiu ne gxenas la trafiklaboron c/ havu la oficialan sxildon de oficiala organizacio. ofte ecx oni

preparas transparentojn. (iu devas respondeci- cxar povas ecx okazi mortaj akcidentoj tio ne povas esti tro spontana . kiel sportkibicado) d/ zorgi ke ne ekestu la dangxereco, ke ene de grupo eniruhomoj kiuj sxatas rebelion, detruan agadon aux teroristoj mem. e/ prizorgu por homoj la zorgon de kuracistoj kaj la unua helpo 3/ Mi legis en Ondo, sed tamen la frazon- mi ne komprenas (mi citas :) "la estraro de UEA klopodas partopreni la konferencon" Laux informo devas okazi (marsxo kaj konferenco), : 6-an de decembro kunveno en Geneva , poste marsxo al sidejo de UK. Rimarko : jxurnalojn mi ricevis 15-an de decembro, do pri grava arangxo fakte oni frue ne sciis-kial? kiu respondecas ?

4/ Certe multaj partoprenis mi ankaux en PL, Svislando kaj DE la 1-an majan marsxon, (laste ecx antaux kelkaj jaroj en Berlin kaj Munkeno)-tamen cxiam estis

pli frue anoncitaj kaj cxiam estas sekurigita de polico kaj kuracistoj. 5/ Pardonu-miaj rimarkoj venis de tio, ke mi detale trastudis materialojn rilate al provoj enkonduki Esperanton al Ligo de Nacioj kaj ankaux raportojn de Rugxa Kruco.

Oni kunvenis kaj kolektis vocxojn- skribe kaj skribe estis ankaux portita per respektindaj kaj gravaj homoj - peticion. Simile - laux mi tiamaniere same

fakte ni povas ion gravan kaj seriozan fari. Ekzemple iniciati kaj kolekti la subskribojn por enkonduki esperanton kiel la oficialan lingvon kaj sur la komenco

meti la nomon de ekz Nobelpremiitaj homoj- (Selten,ano de AIS Gorbacxov cxu iam ano de IKUE - Walesa, ankaux certe la respekton havas la AIS Prezidanto- Prof HG Frank- ankoraux tre aktiva profesoro en Sibiu) Ni estas certa, ke Rektoro de TU en Lublin - prof. d-ro hab W. Stepniewski (ankaux ano de AIS) kolektos subskribon de studentoj kaj de aliaj rektoroj en Lublin, kiujn li konvinkis al AIS - agado, kaj nun li fakte ricevis taskon reaktivigi la AIS- Filion en Pollando

kaj jam havas por kunlaboro ne nur prof el AIS sed kvar Rektorojn en Lublin.

Poste oni povas peti simpatiuojn ne esparantistojn- sercxante ne nur konatulojn sed ankaux aliajn tre gravajn, eminentajn personojn. Laux mia scio Profesoro Liang Ziming el Cxinio- Rektoro de Universitato jam varbis plurajn homojn kaj ecx poetis mian edzon por helpo cxar li planas krei AIS klerigejon kaj Filion en Cxinio.

Ankaux en Budapesto en Universitato oni instruas studentojn kaj e-to estas ofta lingvo, per kiu oni faras la sxtatan ekzamenon pri fremdlingva kono. 6/ Dum lasta (3-a) Tutmonda renkontigxo de sciencistoj – poldevenaj oni pritaksis Esperanton (citis vortojn de Prof Klemensiewicz) kiel la polan mondscale gravan- kulturan heredajxojn. Farante rapidan enketon evidentigxis ke inter 300 partoprenantoj, preskaux 22° dum studentaj jaroj lernis esperanton, kaj de tiuj 80 bone konas, kaj

cxuij forte subtenas.(ankaux subtenas polaj konsuloj) 7/ Por resumi- Mi favore subtenas cxuijn agadojn de homoj por esperanto. Do oni devas negoci kun estraro, ne peti aux timeme protesti- esperantistoj devas kaj povas esti kunpartneroj- nu, bone ke ene ili estu ankaux fortaj kaj konkordaj,

Mi estas i. a de fako- kaj iam praktike- politologo, do mi scias ke por politikistoj oni devas montri argumentojn, ne petojn kaj racie argumenti, postuli ne peti.

Oni necese montru la Asocion kaj persone respondecantajn cxefojn, kaj poste ankaux esperantistojn eminentajn profesorojn, politikistojn kaj agantojn en kulturo cxu ecx la estrojn de religioj- ekzemple Papon Jan Pawel II- 8/ Bedaurinde en(revuo)- Esperanto ne okazas konkretaj informoj.(oni ironie diras sxpamoj - en jxurnalistiko oni oficiale nomas- sxpuntoj) jxurnalistoj strebas al grandegaj artikoloj (nia tempo estas rapida kaj oni devas ricevi tiel-nomatajn :telegrafajn informojn – rapidajn aktualajn kaj nelongajn - Cxu (ne ofendigxu) ne

aperas tro malmulte prisimpla e-to agado de diversaj lokoj kaj kluboj, kaj cxu ne aperas tro da kvereloj, -rondaj, aux grandaj artikoloj de cxiam la samaj homoj.

Finante- : mi deklaris kunlaboron kaj helpon, do mi, kaj mia edzo kaj miaj infanoj certe helpas- Tamen devas esti tre bone kaj precize pripensita plano kaj strategio. Oni gxenerale subtenas diversajn formojn de agado, sed malkonsilas tumultan- haosan hazardpersonajn marsxadon- pro dangxereco, ke oni ne havas eblon garantii sekurecon dum amasigo de diversaj homoj. Ankaux diskutoj (debatoj) devas esti konkretaj, kun klara rezolucio- kaj se jam estas oni

ne povas pridubi ies sencon, nur pro tio ke iu ne venis aux en gxusta momento ne aligixs cxu partoprenis. Ekzistas do homoj kiuj atendas sed tuj riprocxas aux komencas post finita laboro kritiki, pridubi cxu nei. Tiamaniere oni detruas

jam fruan laboron kaj energion de aliaj. Tutsimple oni ne respektas laboron kaj tempon de aliaj iliajn forton kaj tempon. Por venko- oni scias estas bezonataj junuloj. Famajn revoluciojn oni atingis havante enangagxigo de junuloj cxu studentoj. Junuloj estas energiaj kaj kuragxaj. Pro tio ni ankaux invitu la junulojn, sed ne per sloganoj sed per vera amika invito, por ke oni ne diru, ke e-klubo kaj movado estas fermaj kaj oni ne varbas aliajn, novulojn cxu ne sercxu subtenulojn ecx se ili ne konas aux ne perfektas en lingvo- suficxe multe signifas se ili subtenas ideon kaj kunhelpas.

Alicja Lewanderska-Quednau kun HD Quednau , infanoj kaj nepoj.

AIS kaj Ni

La afero de AIS-filio en Albanio

Jam delonge oni parolas pri la fondo ankaux en nia lando de AIS-filio. Tiun ideon subtenis pluraj niaj bakalau'rig'intoj c'e la Studumo kaj klerigejo de AIS en Pollando , same niaj sekcianoj. Sabate , la 31-an de januaro okazis spontana renkontig'o de s-roj Vasil Pistoli, Shaban Hasani kaj Bardhyl Selimi dum kiu pridiskutig'is la ideo envorte. Releginte la leteron de prof. Quednau pri la pas'oj irendaj por atingi la celon, diskutantoj esprimis sian opinion. Kvankam la ideo estas bona kaj utila, rimarkis s-ro Vasil, mem la entrepreno estas tre serioza kaj respondeca. Shaban aldonis ke oni nepre bezonas iun bonfarulon ric'an por sponsori komence la fondon de tia institucio. Cetere niaj studentoj ankoraux preferas studi eksterlande ol en Albanio.. Bardhyl eldiris ke la homa bazo jam ekzistas , c'ar ni havas plurdekojn da bakalau'rig'intoj, kvankam ili g'enerale ne estas farig'intaj aktivaj esperantistoj kaj movadanoj. Fine oni konkludis ke estus necese okazigi g'eneralan kunvenon kun niaj bakalau'rig'intoj kaj magistratoj , same kun aliaj enlandaj movadanoj por pli sag'e kaj konvinke decidi kion ni faru.

Rita Permeti

INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO EN BYDGOSZCZ STR.M.SKLODOWSKIEJ-CURIE 10, PL 85-094 BYDGOSZCZ POLLANDO

tel. (48-52) 346-11-51 e-mail: stud@esperanto-turismo.com

NI INVITAS AL STUDADO DE TURISMO, KULTURO KAJ LINGVOJ en 2004/2005

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo estas trijara nepublika post-maturecekzamena lernejo funkcia ekde 1991, laulegxe registrita c'e Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz (n-ro 232/94) kaj c'e la Urbestro de Bydgoszcz

(n-ro 51/99). En 1996 la studumo akiris la statuson de klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. En la studumo instruadas lekciistoj de AIS, Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, Akademio de Bydgoszcz, Kujavia-Pomerelia Centro por Edukado de Instruistoj, Vojevodio Kulturcentro en Bydgoszcz, krom tio jxurnalistoj kaj spertuloj de Pola Turisma-Landkona Societo, Societo de Amikoj de la Urbo Bydgoszcz, Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo de Kujavio kaj Pomerelio, Pola Esperanto-Asocio kaj Flugokompanio.

En la studumo povas studi c'iu persono, kiu finis 18-an vivjaron kaj havas

almenau meznivelan edukitecon (maturec-ekzamenon) kaj bonan san-staton. Plena eduk-ciklo dauras tri jarojn kaj permesas akiri sciojn necesajn por labori en

nau profesioj (simboloj de Europa Unio): post la 1-a studjaro au' akireblaj kvalifikoj: lektoro de Esperanto por komencantoj kaj gvidanto de porinfanaj arangxo; profesioj/postenoj: oficisto pri turisma informado (422104), oficisto en vojaĝagentejo (422103) kaj internacia vojaĝgvidanto (511301); post la 2-a studjaro au' kvalifikoj: lektoro de mez-nivelaj kursoj de Esperanto kaj verkanto de arta keramiko; profesioj/postenoj: organizanto de turisma priservado (341401), regiona turisma c'ic'eronon (511304) kaj animanto de kultura agado (347601);

post la 3-a studjaro au' profesioj/postenoj: kursgvidanto de Esperanto (235910), specialisto pri organizado kaj disvolvo de turismo (241915) kaj specialisto pri organizado de kulturo (241990); ev.titolo de bakalauro de AIS pri humanistiko au morfosciencoj. Lau dekreto de la pola Ministro pri Edukado de 1^a agosto 2000, kiu estis publikigita en la sxtata legx-jurnalo au' fin-diplomoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo validas kiel oficialaj polaj dokumentoj rajtigantaj c'ic'eronojn kaj vojaĝgvidantojn labori en Esperanto. En la jaro 2004/2005 kadre de la Studumo oni planas kunlabore kun Buroo de Vojaĝxantoj au' Flugo- gvidadon de specialigitaj kursoj pri turismo, kulturo kaj bizneso kaj ankaŭ konversaciaj lingvokursoj. Kunlaboro kun AIS San Marino kaj sciencaj institucioj en Pollando permesas akiri sciojn pri diversaj branc'oj de scienco au' i.a. pri ekologio, eurologio, etnologio, etnografio, kultur- kaj soci-geografio, interlingvistiko, historio, politikaj sciencoj, komerco, merkato kaj estrado. La studjaro 2004/2005 daŭros ekde septembro 2004 gxis majo 2005 kaj ampleksos: lau c'iu taga sistemo po 30-40 studhoroj semajne (ferioj decembre kaj februare), kaj lau t.n. eksterc'eesta sistemo au' tri stud-ekzamenajn sesiojn: fine de septembro 2004, januare/februare 2005 kaj aprile/maje 2005. Eksterc'eestaj gestudentoj povas ankaŭ par- topreni, sen krompago, libere elekteblajn kursojn ekster la sesioj. Dum la jaroj 1991 g'is 2003 lecionojn en la Studumo gvidis lekciistoj el 42 landoj de Europo, Afriko, Ameriko, Azio kaj Australio por gestudentoj el 52 landoj de la mondo. La plej ofte uzataj lingvoj en la Studumo, apud la pola kaj Esperanto, estis: angla, hispana, franca, litova, albana, itala, mongola, germana kaj rusa. La gestudentoj konatigxis tiel pri kulturo kaj lingvoj de diversaj nacioj, kaj fremdlandanoj ankaŭ pri la polaj. La studkotizoj por la studjaro 2004/2005 estas samaj por ambau sistemoj au' 200 USD au 200 euroj (gxis la fino de 2003). Kaze de enpago kaj neblo alveni la kandidato povas prokrasti la studentigxon gxis la sekva studjaro (t.e. 2005/2006), studentigi anstataŭe alian personon el la sama au alia lando, au se eblas utiligi la pagon por internaciaj vojaĝoj de la Internacia Klubo Esperantotur; resendo de la mono ne eblas. Aligxojn akceptas la sekretario de la studumo (adreso komence); la studkotizojn oni pagu al bankkonto: Bank Pocztowy SA O/Bydgoszcz n-ro 80 13201117 2034 0100 2000 0001 por MiA™ dzynarodowe Centrum Kultury i Turystyki au' Kujawy i Pomorze gxis la fino de 2003 j. (poste 250 USD au 250 euroj). Grave: sen stud-pago ne eblas ricevi invitleteron, se la aligxinto gxin bezonas por akiri polan vizon; krom tio konsideru, ke ekde septembro estas tre malfacile arangxi vizon por la kuranta studjaro, tial indas aligxi kaj pagi frue, prefere gxis junio. La viv-kostoj en Bydgoszcz (logxado+mangxado) estas ekde US\$ 100 au 100 euroj C'iumonate au' kaj tiujn oni povas pagadi surloke. Gestudentoj de la studumo povas ankaŭ studentigxi c'e la Akademio Internacia de la Sciencoj (krom-kosto 32,50 eu'roj), kio rajtigas al 80% rabato de kromaj kurset- kaj ekzamen-kotizoj de AIS en Bydgoszcz au aliloke en centra/orienta Europo au' kaj al c'iu fin- studentoj permesas akiri la titolon de bakalauro, kaj post

pliaj du stud-jaroj ec' magistro de AIS pri humanistiko au morfosciencoj. Bonvenon al nia internacia studumo kaj AIS-Klerigejo Bydgoszcz(AKB)! Sekretario de la Program-Konsilio Prezidanto de la Program-Konsilio (au') mag. Wojciech Ruminski (au') ASci.**mag. Andrzej Grzbowski**

BUS en Pollando aprilo-majo 2004

Karaj gekolegoj el Bydgoszcz,

Vi skribis:

Ni atendas findecidon, cxu 5 BUS okazos en Bydgoszcz dum 24 aprilo - 2 majo 2004 kun la 25 AKB Sesio, cxu nur dum 24-28 de septembro 2004, kun la 26 AKB-Sesio pli bona estus kompreneble aprilo/majo 2004, kiel ni skribis. La senato de AIS en Komarno konstatis, ke okazigo de BUS 5 dum 2004 en Pollando (prefere Lublin au Bydgoszcz) estas dezirinda. Estas nun la tasko de la organizantoj varbi la necesajn partoprenantojn, por ke la kondic^oj de BUS estu plenumitaj. Mi alig^as al tiuj varb-klopodoj kaj petas c^iujn gekolegojn (efektivajn membrojn kaj asociitajn docentojn de AIS) anonci al la organizantoj en Bydgoszcz (stud@esperanto-turismo.com) kaj al la klerigofico (quednau@wzw.tum.de), je kiu tempoperiodo ili povus partopreni la studadsesion, kaj c^u ili povas eniri ekzamenkomitato kaj/au oferti kurson en ILo. La kondic^oj por okazigi BUSon estas publikigitaj en la reto: <http://www.ais-sanmarino.org> -> studado -> BUS-regularo. La plej malfacile plenumbla punkto estas, ke devas partopreni (kiel ekzamenanto au preleganto) almenaŭ 3 efektivaj membroj, kiuj estas (vic-)senatanoj, (vic-)dekanoj au (vic-)fakarestroj, kaj inter kiuj estu minimume unu (vic-)senatano. Mi mem jam ripete deklaris, ke mi nepre *ne* estos disponebla en aprilo/majo. C^ar Bydgoszcz estas la akademia hejmo de la plej granda parto de nia g^isnunaj studentoj, bakalauraj kaj magistroj, mi elkore petas c^iujn gekolegojn favore konsideri la eblecon, ke li/s^i povus kontribui al BUS 5. G^is nun anoncis sin al bakalaura ekzameno el Bydgoszcz 15 kandidatoj - inkluzive 2 kandidatinoj el Latvio, kiuj jam finis la studadon en Bydgoszcz (Krome anoncis sin 7 kandidatoj por magistrig^o, sed tiuj devas c^iukaze veni al Komarno) Esperante pozitivajn respondojn elkore salutas **Dieter Quednau**

LA 15a RUMANA STUDADSESIONO

19 februaro – 06 marto 2004

**La 1a semajno
19.02 – 22.02 2004**

horo / tago	jaudo 19.02	vendredo 20.02	sabato 21.02	dimanco 22.02
16 – 19	Ilo por sciencistoj Adoc. BUTAN MARIA	Ilo por sciencistoj Adoc. BUTAN MARIA	Ilo por sciencistoj Adoc. BUTAN MARIA	Ilo por sciencistoj Adoc. BUTAN MARIA

	s. 15	s. 15	s. 15	s. 15
--	-------	-------	-------	-------

La 2a semajno
32.02 – 29.02 2004

horo / tago	Lundo 23.02	Mardo 24.02	Merkredo 25.02	Jaudo 26.02	Vendredo 27.02
8 – 9					
8 – 12				Machinelle Übersetzung Prof. FOSSMEIER <u>S. 45</u>	Machinelle Übersetzung <u>Prof.</u> <u>FOSSMEIER</u> s.45
9 – 13					
12 – 15	Ilo por progresintoj Adoc. BUTAN MARIA s. 15	Ilo por progresintoj <u>Adoc. BUTAN</u> <u>MARIA</u> s. 15	Ilo por progresintoj <u>Adoc. BUTAN</u> <u>MARIA</u> s. 15		
15 – 18	Ilo por sciencistoj Adoc. BUTAN MARIA s. 15	Ilo por sciencistoj Adoc. BUTAN MARIA s. 15			Ilo por komencantoj Mag. VLAD DIANA s. 15
15 – 19					Masina tradukado Prof. Foosmeier s. 45

La 3a semajno
01.03 – 06.03.2004

horo / tago	Lundo 01.03	Mardo 02.03	Merkredo 03.03	Jaudo 04.03
--------------------	--------------------	--------------------	-----------------------	--------------------

8 – 10	Informaci- psihologio Prof. FRANK s. 15	Informaci- psihologio Prof. FRANK s. 15	Informaci- psihologio Prof. FRANK s. 15	Informaci- psihologio Prof. FRANK s. 15
10 – 12	Masurarea coeficientului de inteligenta Adoc. MIHAESCU DIANA s. 15	Masurarea coeficientului de inteligenta Adoc. MIHAESCU DIANA s. 15	Masurarea coeficientului de inteligenta Adoc. MIHAESCU DIANA s. 15	Masurarea coeficientului de inteligenta Adoc. MIHAESCU DIANA s. 15
8 – 12				
15 - 19	<u>Europa</u> <u>merkado</u> Prof. WICKSTROM s. 15	<u>Eurologio</u> Prof. LOBIN s. 15	<u>Eurologio</u> Prof. LOBIN s. 15	<u>Turismo en</u> <u>Europo</u> Prof. LEONOV s. 15

Informoj el Heroldo Komunukas

Esperanto kaj hebreej - LA 27an DE JANUARO
 En chi tiu tago de 1945 la sovetia armeo atingis Auschwitz, kaj la hororo de la ekstermejo definitive malsekretighis. Tial la 27a de Januaro estis elektita kiel Rememora Tago: en Europo kaj aliaj kontinentoj ni rememoras la milionojn da judoj, ciganoj, disidentoj, samseksemuloj kaj tiel plu murditajn en la dua mondmilito. En la kaj tiel plu trovighas malpli gravaj popoloj au persekutitoj, kiuj tamen ne malpli suferis. Foje ilia genocido estis proporcie pli granda ol tiu de judoj au ciganoj. Ni pensu ekzemple pri la livona popolo: el 40.000 pretervivis nur milo. En la kaj tiel plu trovighas ankaŭ nia esperanta popolo. Ni neniam scios precize kiom da E-istoj pereis en ekstermejo. Ili registrighis kiel judoj, au komunistoj, au alio. Chiu Zamenhofido estas alkalkulita kiel hebreo. Sed ili chiu estis ankaŭ polaj shtatanoj; kaj E-lingvanoj. Fine de la vizita itinero en la ekstermejo de Madjanek situas arbareto el nigraj krucoj. Ili estas malaltaj kaj larghaj, kaj sur chiu estas skribita la nomo de popolo, kiu estas ankaŭ idiomo. Mankas la nia: esperanto. Se ghi estus, ni rememorus ke la unuaj viktimoj de la ekstermado estis germanaj shtatanoj. Char E-istoj estis inter la unuaj persekutatoj en Germanio. Nia eta kruco vere ampleksus la tutan Europon. Se shi ankoraŭ vivus, la 27an de januaro 1945 Lidja Zamenhof estus preskau 41-jara: nur du tagojn poste shi festus sian datrevenon. Ni perdis Lidjan Zamenhof dufoje. Ni perdis chiujn niajn samlingvanojn dufoje. Char ili mortis, kaj char oni ne memoras ilin kiel E-istojn. Tial la Rememora Tago akiras apartan signifon almenaŭ por la raumistoj, nome por tiuj kiuj sentas Eon ankaŭ identigilo. Mi esperas ke iam la Esperanta Civito estos sufiche forta por postuli de la tuta mondo la respekton por niaj viktimoj, por tiuj kiuj perdis la liberon kaj la vivon char esperantistoj.

Giorgio

Silfer

FONDIGHIS STUDENTA EUROPA ESPERANTO-LIGO - STELO

Studenta Europa Esperanto-Ligo fondighis antaŭ nelonge che la universitato de Torino (Italio), kiel asocio kun jura personeco laŭ la itala civila kodo. La oficiala adreso estas che la Torina Universitato (Departemento de Orientalistiko, kurso pri interlingvistiko kaj esperantologio), la retadreso <studento@unito.it>. STELO estas strukturita laŭ lokaj centroj, el kiuj unu funkcias kiel Buroo. En sia fonda asembleo STELO elektis c-inon Giulia Gagliardi prezidanto, s-anon Paolo Sorgi vicprezidanto, c-inon Carla Siano sekretario kaj kasisto. La kunordiganto de la Torina loka centro estas c-ano Diego Fiumarella. STELO celas proponi servojn al la esperantlingvaj studentoj kaj realigi projektojn kadre de la programoj de Europa Unio. Ĝi tamen estas malfermita ankaŭ al aliaj kontinentoj. Kun STELO jam prenis kontakton, ekzemple, studentoj de diversaj fakultatoj en Meksikurbo. Ankaŭ studentoj en Bulgario kaj Hungario havis la unuajn kontaktojn. Kunlaboron jam establis Itala Interlingvistika Centro. Jarkunveno de STELO okazos eble en Svislando, meze de aŭgusto 2004, dum la seminario por kulturaj managheroj, planata de Kultura Centro Esperantista kun Tutmonda Esperantista Junular-Organizo. Por alighi al STELO necesas pruvigi sian studentecon: la aĝo mem ne gravas: gravas esti en universitata matrikulo.

ROTTERDAMO EN SAKSTRATO

Osmo Buller, kiu en julio 2001 rezignis pri la posteno de ĝenerala direktoro che UEA, kun publikaj (ĝhis nun ne reprenitaj) insultoj al siaj dungintoj, ĵus kandidatighis por la sama posteno, vaka ekde aprilo 2004. Pli frue, s-ro Buller anoncis sian intencon kandidatighi kiel komitatano B, kaj lasis la ĝeneralan opinion kredi, ke li akceptus kandidati eĉ por la prezidanteco de UEA. Tio da "Jen mi! Jen mi!" aldonas groteskon al la longa, turmentoplena felietono en Roterdamo. Se konsideri la opinion de komitatano Kokolija (unu el la tri kiuj malaprobis la UEA-buĝeton 2004), kiu pledas por nomumi novan direktoron nur post la baloto por la nova estraro (julio 2004), ŝajnas ke s-ro Buller sekvas jam propran vojon, pli kongrue al la personaj interesoj ol la strategio de la interna opozicio kiu ekprofilighis en UEA antaŭ kaj dum la Gotenburga UK. Aliflanke, estas eble ke Osmo Buller eniros la Komitaton, sed tre malprobable li estus elektita kiel prezidanto: certe la bullerismo multe kontribuis damaĝi la reputacion de la nuna estraro, sed interne al la Komitato la eliranta prezidanto Renato Corsetti kaj aliaj estraranoj daŭre ĝhuas pli da prestiĝo ol Buller mem. La movo kandidatighi por la direktora posteno ne estas do tute erara: se la celo estas reiri al Roterdamo, Buller atingos tion kiel dungito pli facile ol kiel prezidanto. Je la limdato 30 novembro 2003 nur tre malmultaj kandidatighoj alvenis, kio fortigas la esperon de Buller. Sed li devas kalkuli kun pluraj minusoj: li estas "persona non grata" en pluraj E-medioj, li devas pansii la vundon de la konflikto kontraŭ sia estraro, kaj li devas ree pruvigi sin profesie kompetenta. Liaj jaroj kiel ĝenerala direktoro lasis dubojn pri tio: ja la estraro faris nenion por reteni lin, en 2001. Kaj la kapablo demonstri, ke la posteulo estas fushulo, ne atestas pri la profesieco de la demonstrinto. Pli grava minuso devenas el la demando: ĉu la reveno de Buller signifas la revenon de unu homo aŭ de tuta

teamo? Li ja povus tuj redungi s-rojn Zapelli kaj Vauthey, daure senlaborajn kaj loĝhantajn en Roterdamo. Kaj tuj fordanki la nunan redaktoron, kontraŭ kiu kreskas la kritikoj en "Libera Folio". Roterdamo shajnas pli kaj pli en sakstrato.

C'erpita de Heroldo Komunikas

Gratuloj de Germain Pirlot

Koran dankon pro via bulteno. Informcele mi aldonas mian nunan malneton pri E-kursoj en universitatoj kaj altlernejoj; vi rajtas uzi ĝin lau'plache. Kore via, Germain Pirlot

Studado pri turismo en Esperanto

Pollando

Bydgoszcz

a) Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, ekde 1991, laŭleĝe registrita ĉe Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz (n-ro 232/94) kaj ĉe la Urbestro de Bydgoszcz (n-ro 51/99). En 1996 la studumo akiris la statuson de klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. En la studumo instruadas lekciistoj de AIS, Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, Akademio de Bydgoszcz, Kujavia-Pomerelia Centro por Edukado de Instruistoj, Vojevodio Kulturcentro en Bydgoszcz, krom tio ĵurnalistoj kaj spertuloj de Pola Turisma-Landkona Societo, Societo de Amikoj de la Urbo Bydgoszcz, Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo "Kujavio kaj Pomerelio", Pola Esperanto-Asocio kaj "Monda Turismo".

b) 3-jara nepublika post-maturecekzamena lernejo ; rajtas studi ĉiu persono, minimume 18-jara, kun almenaŭ mez-nivelan edukitecon (maturec-ekzamenon) kaj bonan san-staton. Plena eduk-ciklo daŭras tri jarojn kaj permesas akiri sciojn necesajn por labori en naŭ profesioj (simboloj de Eŭropa Unio):

- post la 1-a studjaro --akireblaj kvalifikoj: lektoro de Esperanto por komencantoj kaj gvidanto de porinfanaj aranĝoj; profesioj/postenoj: oficisto pri turisma informado (4220104), oficisto en vojaĝagentejo (4220105) kaj internacia vojaĝ-gvidanto (5110301);

- post la 2-a studjaro -- kvalifikoj: lektoro de mez-nivelaj kursoj de Esperanto kaj verkanto de arta keramiko; profesioj/postenoj: organizanto de turisma priservado (3410402), regiona turisma ĉiĉerono (5110304) kaj animanto de kultura agado (3479001);

- post la 3-a studjaro :-profesioj/postenoj: kursgvidanto de Esperanto (2359007), specialisto pri organizado de kulturo (2410310) kaj specialisto pri organizado kaj disvolvo de turismo (2410309); ev.titolo de bakalaŭro de AIS pri humanistiko aŭ morfosciencoj.

Laŭ dekreto de la pola Ministro pri Edukado de la 1-a de aŭgusto 2000, kiu estis publikigita en la ŝtata leĝo-ĵurnalo - fin-diplomoj de la Internacia Studumo pri Turismo

kaj Kulturo validas kiel oficialaj polaj dokumentoj rajtigantaj ĉiĉeronojn kaj vojaĝ-
gvidantojn labori en Esperanto.

Kunlaboro kun AIS San Marino kaj sciencaj institucioj en Pollando permesas akiri sciojn
pri diversaj branĉoj de scienco - i.a. pri ekologio, eŭrologio, etnologio, etnografio, kultur-
kaj soci-geografio, interlingvistiko, historio, politikaj sciencoj, komerco, merkato kaj
estrado.

Info : **sekretariejo de la studumo** : str.M.Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094
Bydgoszcz ;
tel. (48-52) 346-11-51) turismo@bydg.pdi.net

+++++

Oportuno por havi universitatan instrumaterialon en Esperanto

La fama instituto Massachusetts Institute of Technology-MIT, Boston, Usono, ekdisponigas rete sian instrumaterialon ĉe: <http://mit.edu/> <http://ocw.mit.edu/index.html> videblas "Open Course Ware", kiu sekvas la filozofion de liberaj programoj, liberigante la uzadon por ke ĝi servu profiton de multaj personoj, kaj por ke ĝi kresku per aldono de materialoj. Unu el la ebloj estas, kompreneble, ĝia traduko. Se oni volas traduki ĝin, ekzemple al Esperanto, oni povas uzi ĝin libere. Momente ankoraŭ ne estas tre multaj materialoj tie, mi perceptas, almenaŭ por fiziko, sed la ideo estas havi tie la tutan materialon de MIT, inkluzivante eĉ kelkajn vidfilmojn.

Oferto

Estimata, en la februara Monato aperos mia traduko el la novelo "La brulanta virino" de Frank Roger, kiun cxi pseuxdonima flandro verkis origine en la nederlanda (sed liveris "kun-oficialan" anglan tradukon). Vidu kiel aldonajxon. La homo ege ambicias ke liaj verkoj aperu en kiel eble plej multaj lingvoj, kaj jam atingis tion en 13 lingvoj (sed ne en la albana). Mi levis cxe li la klasikan ideon uzi Esperanton kiel pontlingvon al pli ekzotaj lingvoj (aux simple tiaj en kiuj li ne publikigxis), emfazante ke la trovotaj tradukistoj povos legi ankaux la anglan, tiel ke ne okazos misformigxo pro duobla tradukado. Sxajnas ke li pretas ankaux pagi por la tradukoj (almenaux gxirante la monon al konto cxe Flandra E-Ligo). Min li jam pagis, cx. 70 euxrojn. Nur unu hiko ankoraux. Laux li, "se oni volas ke la tradukoj estu publikigitaj, tiam necesus ankaux ke la tradukistoj havu la necesajn kontaktojn kun revuoj aux eldonistoj sialande". Cxu la afero interesas Vin? **Amike István Ertl**

Esperanto-versio

LA BRULANTA VIRINO

Frank Roger

La rozoj delikate disodoris en la jxus malvarmigxinta ekvespero. La lastaj sunradioj prilumis jam nur nubojn alte super la horizonto. Nun igxadis rapide pli malvarme, kaj la nuboj sxangxis koloron de hel-orangxo al karmezino kaj purpuro. La viro tamen restis stari en la malfermita verando. Reveme li rigardis la svagajn movigxojn de la malhelo antaux si, dum la rapide nigrigxanta cxielo ekmontris tie kaj jen siajn unuajn scintilojn stelajn.

Li eksidis en sia kana segxo kaj prenis la glason da konjako de la ebura tableto. La ambrokolora likvo preskaux gagate nigris en la krepusko. Li igis la likvon cxirkauxflui en sia glaso kaj pensis pri nenio aparta. Tiam li levis la rigardon--

--kaj la unuan fojon ekvidis la brulantan virinon.

Sxi pasis tre fore, je la limo de lia vidkampo, inter la nur apenaux videblaj arbustoj kaj arboj. Dum sekundo sxajnis al li auxdi ehxon de sxia tinta rido tra la malluma aero nokta.

Sed tio devis esti eraro. Li dormis tute pace tiun nokton.

Kiam la postan tagon la suno subeniris en maro da flamoj, li versxis al si konjakon kaj eliris el la domo. Ne blovis vento en tiu vespero. Li prenis sian kanan segxon kaj iris sidigxi malantauxe en la korto. Eble duonhoron li restis tie, gxis la konjako elcxerpigxis. Li fiksrigardis la perfekte sennuban cxielon, admiris la stelojn.

Poste li subite rigardis rekte antaux sin--

-- kaj denove vidis la brulantan virinon.

Nun sxi estis pli proksime, kvindekon da metroj for de li. Li sentis sian koron forte ekbati kaj cxi-foje klare auxdis sxian kristalklaran ridon. Sxajnis ke sxi pasxas nudpiede, kaj sub la flagranta flamvesto sxi portis travideblan robon pendantan gxis la grundon. Sxi pasxis rapide, tre rapide, multe tro rapide.

Tiun nokton li dormis tre bone. Li songxis pri kameno, en kiu orangxegaj flamoj dancis cxirkaux lignoblokoj.

La sekvan vesperon li atendis sxin. Kun sovagxe batanta koro li sidis en sia kana segxo kaj alrigardis la mallumon. La malplenan domon kaj la stelojn li neniom priatentis. Ecx la rozan odoron li ne sentis, kvankam gxi plenigis la aeron. Li nur sidis kaj atendis sxin.

Lian paciencon kronis sukceso--

--nun sxi venis multe pli proksimen al li, kaj li povis vidi la flirton de sxiaj longaj, fajre rugxaj haroj, dum sxi preterkuris flam-kadrate.

Finfine li sciis al kiu sxi ridas; ne plu eblis ajna dubo. Sxia legxera rido plenigis la aeron, forpelis la rozodoron kaj la vesperan malvarmon. Malrapide li starigxis el sia segxo, faris kelkajn pasxojn antauxen kaj postrigardis la virinon gxis sxi malaperis dancante el lia vidkampo. Lia pulso regajnis trankvilan ritmon. Morgaux, eble morgaux... Hodiaux sxi jam estis proksime!

Kvazaux en tranco li pasxis en la malplenan domon, fermis la dikajn velurajn kurtenojn, faligis sian rigardon al la polvokovritaj libroj sur la bretoj kaj al la cxina vazo kun magiaj signoj, enspiris la malvarman vesper-aeron, kaj iris dormi inter satenaj littukoj blankaj. Morgaux, eble morgaux...

La postan vesperon li prefere ne trinkis glason da konjako. Blovetis fajna brizo. Li sidis trankvile en sia kana segxo, kun nelegata libro sur la gxardena tablo apuda.

Kiam la suno malrapide sinkis sub la horizonton kaj grade ricxigxis je pli kaj pli da koloroj, lia sango ekfluis pli rapide, kaj liaj pupiloj mallargxigxis. Hodiaux sxi venos tute proksimen, eble gxis apud lin...?

Jen sxi denove--

--li vidis sxin alveni de malproksime, saltadi super la etaj arbustoj, skuante sian longan, legxeran robon en la aero. Sxi retrojxetis siajn harojn kaj lasis la flamojn ludi sur sxia korpo antauxenkuranta.

Sxia rido sonis lauxte kaj klare en liaj oreloj, kaj kiam sxi proksimis al li jam nur je kelkaj pasxoj, sxi ridetis kaj flustris: "Morgaux, morgaux," forturnis sian rigardon kaj forkuris kiel torcxo da lumo kaj varmo. Li forvisxis la sxviton de sia frunto, kaj faris kelkajn rigidajn pasxojn en sxiaj spuroj. Li longe sxin postrigardis, gxis la fajnkontura silueto tro malproksimis por esti distingebla.

Tiun nokton li dormis tre maltrankvile. Li songxis pri arbaraj incendioj, brulsxtiparoj kaj la kauxstikaodoro de sulfuro. "Morgaux," sxi estis dirinta, "morgaux". La flamoj cxirkauxlavis lin, kaj li grumble ruligxis sur sian alian flankon.

Kim la postan vesperon li vidis sxin preterkuri kiel torcxon da flamoj, li renversis sian glason ankoraux duone plenan. La ambrokolora trinkajxo fluis de la tablo sur lian pantalonon. Li ecx ne guton atentis pri tio.

Li rigardis--

--kiel sxi venas lin trafi lauxte ridante, kun etenditaj brakoj, kaj lia koro ekbatis pli rapide, li sxanceligxis, sed sukcesis resti stara, mem etendis la brakojn, kaj fermis la okulojn, kiam sxiaj flamoj lin cxirkauxfermis kaj sxiaj fajraj lipoj alpremigxis al la liaj...

*
* *

La infanoj sciis ke ili devojigxis tro malproksimen, kaj ke hejme atendas ilin eble solida skoldo. Ili decidis unue iom ripozi cxe la forlasita domo, antaux ol ekiri sur la revena vojo.

Unu el la knabinoj kuragxis enpasxi en la domon, sed sxi vidis neniun. Sxi vokis kelkfoje, sed respondo ne venis.

Tiam ili eniris cxuij. Iom timeme ili trapromenis la tutan domon, sed neniun trovis.

En la gxardeno, male, ili trafis la kadavron de viro. Gxi estis komplete karbigxinta.

Anglalingva versio

The Burning Woman

by Frank Roger

The exquisite smell of roses filled the evening air. The sun cast its last rays on the clouds floating high above the horizon. It was growing colder, and the

clouds began to change colour : bright orange slowly turned into crimson and purple.

Yet the man remained on the porch, staring silently and dreamily into the darkening sky, looking at the vague movements in the murk that enveloped everything, until the first twinkling stars appeared.

With a sigh he sat down in his wicker chair, and reached for the glass of brandy on the ebony table at his side. The dusk had turned the amber liquid virtually black. He picked up the glass, gently stirred the brandy, and took a sip. Thinking about nothing in particular, he suddenly looked up--

--and saw the burning woman for the first time.

She was running far, far away, at the very edge of his vision, between the barely visible shrubs and trees; one moment, he thought he could hear her tinkling laughter reverberate in the night air.

It must have been his imagination.

He slept peacefully that night.

*

When the sun went down in a sea of flames, the following day, he poured himself another brandy, and went straight to the porch. There was no wind, no sound.

He sat in his wicker chair, staring silently out over the fields beyond the garden's fence for maybe half an hour. He had nearly finished his brandy, and simply admired the perfectly cloudless sky and the stars.

Then, suddenly, he looked right in front of him--

--and saw the burning woman again.

She was closer this time, maybe fifty meters away from him. He felt his heart throbbing furiously, could clearly hear the woman's bright laughter, noticed she was running barefoot. Underneath the flickering flames she wore a translucent gown reaching down to the ground. She was running fast, much too fast.

He slept well that night. He dreamed of a hearth-fire, its bright orange flames dancing around the logs of wood.

*

The following night he was actually waiting for her, sitting in his wicker chair, his heart throbbing frantically, his eyes scanning the darkness. He paid no attention to the empty house behind him and the stars overhead, and failed to notice the smell of roses that suffused the atmosphere. He just sat there, yearning for her.

At last his patience was rewarded--

--this time she was a lot closer to him; he could see her running along, shrouded in flames, her long, red hair streaming behind her.

Now at least he knew without a shadow of a doubt who she was laughing at. Her light-hearted laughter filled the air, dispelling the smell of roses and the evening chill. Slowly he rose from his chair, took a few steps forward, and gazed in her direction until she disappeared from view. His pulse slowed down again. Tomorrow, maybe tomorrow. She had been very close today.

He went back into the empty house as if in trance, drew the thick velvet curtains, glanced at the dust-covered books lined on the shelves, the Chinese vase adorned with magical symbols, sniffed the chilly evening air, and sought refuge between the satin sheets of his bed. Tomorrow? Maybe tomorrow?

*

The following night he didn't bother to take a glass of brandy with him. There was a faint breeze. He sat silently in his wicker chair, a book on the table at his side, unread.

When the sun changed into a richer colour and finally disappeared below the horizon, he grew nervous and restless. Today the woman would come very close,... maybe right up to him?

She appeared again--

--he saw her coming from far away, cavorting between the bushes, throwing her long, light gown into the air, shaking her mane of hair, flames licking all over her body.

Her laughter resounded loud and clear, and when she was only a couple of steps away from him, she smiled and whispered, "Tomorrow, tomorrow," turned her gaze away and ran off again in a torch of light and heat. He wiped the sweat from his forehead, and stiffly followed her for a few hesitating steps. He kept staring at her for a long time, until her sharply limned silhouette was too far away to be seen.

That night he tossed and turned. He dreamed of forest fires, funeral pyres and the acrid smell of sulphur. "Tomorrow," she had said, "Tomorrow." Flames washed all over him, and grumbling he rolled over on his other side.

*

La albana versio

GRUAJA NË FLAKËRIM

Nga Frank Roger

Atë pragmbrëmje që po freskohej lulet e trëndafililit përhapnin erën e tyre të këndëshme. Rrezet e fundit të diellit ndrisnin tashmë vetëm retë atje lart përmbi horizont. Po ftohej shumë shpejt, dhe retë po e ndërronin ngjyrën e tyre nga portokalli e çelët në të kuqe të errët dhe të kuqe vjollcë. Megjithatë burri po qëndronte ende në verandën e hapur. Ai vështronte i përhumbur lëvizjet e paqarta të errësirës përpara tij, ndërsa qielli që po nxihej shumë shpejt po shfaqte aty këtu vezullimet e veta yjore.

Ai u ul në karrigen e vet prej kashte dhe mori një gotë konjak nga pjatëza prej fildishi. Lëngu në ngjyrën e qelbarit nxinte si qymyr në atë muzg. Ai e tundëte ujin e gotës dhe nuk mendonte për asgjë të veçantë. Pastaj e ngriti shikimin lart- dhe pa, për herë të parë, një grua në flakërim.

Ajo po ecte shumë larg, në kufijtë e fushëpamjes së tij, midis shkurreve dhe drurëve që mezi dukeshin. Për një sekondë, iu duk sikur dëgjoi në ajrin e errët të natës jehonën e të qeshurës së saj tingëlluese.

Por duhej ta kish gabim. Atë natë fjeti shumë i qetë.

Kur ditën tjetër dielli u ul poshtë detit të flakëve, ai e mbushi gotën me konjak dhe doli nga shtëpia. Atë mbrëmje nuk frynte erë. E mori karrigen e vet prej kashte dhe shkoi të ulej prapa në kopësht. Qëndroi atje mbase një gjysëm ore, deri sa e mbaroi konjakun. Vështronte ngultaz qiellin krejt pa re, admironte yjet.

Më pas vështroi papritur drejt para tij- dhe e pa gruan në flakërim sërish.

Tash ajo ishte më afër tij, rreth pesëdhjetë metra larg. E ndjeu zemrën t'i rrahë fort dhe këtë herë dëgjoi një të qeshur të qartë si kristali. Iu duk sikur ajo ecte këmbëzbathur, dhe ndën teshat që valaviteshin në flakë mbante një fustan të tejdukshëm, që i varej gjer në tokë. Ecte shpejt, shumë shpejt, tepër shpejt.

Atë natë, ai fjeti shumë mirë. Ëndërroi për një oxhak, ku flakët e portokallinjta vallëzonin për rreth kërcunjëve të drurit.

Mbrëmjen tjetër, ai e priti atë përsëri. Rrinte ulur në karrigen prej kashte me zemrën që i rrihte egër dhe vështronte errësirën. Nuk e kish mëndjen fare te shtëpia e zbrazët dhe te yjet. Madje, nuk e ndjente as erën e trëndafilave, ndonëse kjo kish mbushur tërë ajrin. Vetëm rrinte ulur dhe e priste atë. Durimi i tij u shpërblye- ajo erdhi tashmë shumë më afër tij, dhe ai mund të shihte se si i sillëshin përqark flokët e gjatë, flokët kuq si zjarri, ndërsa vraponte përbri në katrorin e flakëve.

Më në fund, ai e mori vesh se kujt i qeshte ajo, për këtë s'kishte më dyshime. E qeshura e saj e lehtë mbushte ajrin, zbonte erën e trëndafilave dhe të ftohtin e mbrëmjes. Ai u ngrit ngadalë nga karrigia e vet prej kashte, hodhi disa hapa përpara dhe e vështroi gruan nga pas deri sa ajo u zhduk nga fushëpamja e tij duke vallëzuar. Puls i tij rimori ritmin e qetë. Nesër, mbase nesër..Sot ajo ishte kaq afër!

Ai eci si një sonambul nëpër shtëpinë e zbrazët, i uli perdet e trasha prej kadifeje, e hodhi vështrimin mbi librat e pluhurosor nëpër rafte dhe në vazon kineze me shënja magjike, thithi ajrin e ftohtë të mbrëmjes dhe shkoi të flejë në çarçafët e bardhë prej sateni. Nesër, mbase nesër..

Mbrëmjen tjetër ai nuk pëlqeu të pinte konjak. Frynte një erë e lehtë. Ai rrinte ulur në karrigen e tij të kashtës, me një libër të palexuar pranë vetes aty, mbi tryezën e kopshtit.

Kur dielli u zhyt ngadalë nën horizont dhe shkalë shkallë u pasurua me ngjyra të shumënumurta, gjaku nisi t'i rrjedhë pak më shpejt, dhe bebëzat e syrit iu ngushtuan. Sot ajo do të vijë fare afër, mbase deri te ai vetë..?

Ja ku është sërish- e pa atë të vinte që nga larg, duke kërcyer përmbi shkurret e vockla, duke tundur në ajër fustanin e saj të gjatë e të lehtë. Ajo i hodhi prapa flokët e saj dhe i la flakët të luanin me trupin e saj që bënte përpara.

E qeshura e saj tingëllonte fort dhe qartë për veshët e tij dhe kur iu afrua vetëm disa hapa, ajo buzëqeshi dhe i pëshpëriti: "Nesër, nesër", ktheu vështrimin dhe ia mbathi si një pishtar drite dhe ngohtësie. Ai fshiu djersët nga balli i vet, dhe hodhi disa hapa të ndera mbi gjurmët e saj. E vështroi atë nga pas për shumë kohë, deri sa silueta e saj e hijshme u tret tepër larg sa nuk mund të dallhej më.

Atë natë ai fjeti shumë i shqetësuar. Ëndërroi për zjarre në pyje, turra drushë që digjeshin dhe për erën e pakëndëshme të squfurit. "Nesër" kish thënë ajo, "nesër". Iu duk sikur po e përfshinin flakët, prandaj u rrotullua duke mërmëritur në anën tjetër.

Kur mbrëmjen e mëpsme ai e pa atë të vraponte përbri tij si një pishtar flakësh, ai e përmbysi gotën e konjakut të mbushur ende përgjysëm. Lëngu i qelibartë rrodhi nga tryeza mbi pantallonat e tija. Ai s'e vuri re fare këtë gjë.

Vështroi- se si po vinte ajo përballë duke qeshur me të madhe me krahë të hapur dhe zemra e tij nisi të rrihte më shpejt, ai u lëkund, por mundi të mbajë drejtqëndrimin, zgjati dhe ai vetë krahët e tija dhe mbylli sytë kur flakët e saj e pushtuan të tërin dhe buzët e saj të zjarra u ngjeshën me të tijat..

Fëmijët e dinin se ishin larguar shumë nga rruga dhe se në shtëpi i priste një qortim i fortë. Vendosën të pushojnë pakëz në këtë shtëpi të braktisur, para se të merrnin rrugën e kthimit.

Njëra nga vajzat guxoi të hynte brënda, por aty nuk pa kërkënd. Thiorri me zë disa herë, por s'mori përgjigje.

Atëhere hynë brënda të gjithë . Pak me ndrojtje ata e shetitën tërë shtëpinë, por sgjetën njeri.

Në kopësht, përkundrazi, ata ndeshën me një kufomë burri. Ajo ishte krejtësisht e karbonizuar.

Përkthyer nga Esperanto : Bardhyl Selimi

Versioni në esperanto është dhënë nga Istvan Ertl

When he saw her hurrying along in a whirl of fire, the following night, he knocked down his half-finished glass of brandy. The precious liquid spilled all over the table and his trousers. He did not even bother to clean up the mess.

He looked up--

--and saw how she came running straight up to him, laughing aloud, her arms reaching out for him. His heart was now beating furiously, and he tottered,

but managed to regain his balance. Then he reached out for her too, and closed his eyes as her flames engulfed him, and she pressed her fiery lips against his...

The children knew they had strayed too far from home, and were likely to be taken to task for it when they finally got back. They decided to take some rest before they set off on the return trip.

One of them took the chance to enter the house, but she saw no one. She called, but there was no reply.

Then they all went inside.

Fearfully they checked the entire house, but they ran into no one.

But then--

--on the porch they found the body of a man. It was completely charred.

Legaj'oj –humoraj'oj

Parabolo

Iam en orientlando viro migris kondukanta kamelon per la brido. Subite la besto ekfuriozig'is kaj blekegis tiel terure, ke la kondukanto en granda timo forkuris. Jen li ekvidis puton c'e la vojo kaj ensaltis. Sed falante li ekvidis rubusan arbitaj'on , kiu kreskis el fendo de la puta s'akto. Rapide li ekkaptis ties branc'ojn kaj restis tiel pendanta. Super si li ekvidis la kapon de la sovag'ig'inta kamelo, kiu ree lin volis kapti. Kaj kiam li rigardis al la fundode l'puto- ve! Tie kus'is en la akvo terura drako kun malfermita fau'ko, preta por engluti la bedau'rindulon, se eble li falus malsupren. Tiel pendante inter ambau' dang'eroj, la viro ekvidis du musojn , kiuj sidis c'e la radikoj de la arbitaj'o. Unu estis blanka, la alia nigra; kaj ambau' mordetis la radikojn kaj subfosis la teron c'irkau' ili, kiu fluetis suben, tiel ke la drako rigardis supren esperante, ke la arbitaj'o kune kun la homo baldau' falos. Vane la bedau'rindulo rigardis c'irkau'en pro helpo. Jen li ekvidis branc'eton de la arbitaj'o , kiu portis maturajn rubusberojn. Kaj li ne povis retenigi sin: li ne vidis

plu la furiozan kamelon super si nek la atendantan drakon sub si nek la ruzajn musojn apud si- li prenis beron post bero, gustumis, trovis ilin bonaj kaj forgesis mang'ante c'iun timon kaj teruron.-

Vi certe demandas: "Kiu estas tiu malsag'a homo, kiu tiel facile forgesis dang'eron kaj timon?" Sciu , amiko: Tiu homo estas vi! Kaj nun ankau' au'dui la klarigon: La drako sur la puta fundo estas la morto. La kamelo supre minacanta estas mizero kaj dang'eroj de la vivo. Estas vi, kiu devas pendi inter vivo kaj morto c'e la verda arbitaj'o de la mondo. La blanka kaj la nigra musoj estas la tagoj kaj noktoj, kiuj senc'ese fosadas kaj iam liveros vin al la drako- al la morto. Sed vi forgesas la mizeron de l'vivo kaj la morton kaj la forfluantan tempon kaj estas felic'a, g'uante la plezurojn, kiuj staras c'e la vojo al via tombo!

C'erpita el la libro Tra la mondo, eldonita en la jaro1929 en Leipzig, donaco de Jacques Tuinder

Trafa respondo

Tri petolemaj junuloj renkontis maljunan hebreon, kiun ili volis fari objekto de sia moko. "Bonan matenon , patro Abrahamo!" diris la unua; "bonan matenon, patro Isaako!" diris la dua; "bonan matenon, patro Jakobo!" diris la tria- Vi eraras, sinjoroj" respondis la maljunulo serioze; "mi nomig'as nek Abrahamo, nek Isaako, nek Jakobo. Mi estas Sau'lo, kuneliris por serc'i la azenojn de sia patro; kaj jen- mi trovis ilin".

(C'erpita el la sama libro)

Pagu la kotizon por 2004

Jam estas tempo por pagi la c'ijaran kotizon kiu dau're estos 200 Lekoj. Tiuj kiuj volas havigi al si la bultenon en diskedo bv sendi pos'te liberan diskedon au'ompagi por g'i.

Rita Permeti

El la diplolaboraj'oj de niaj gestudentoj

Lezha kaj g'ia perspektivo en la tria miljaro

Lezha trovig'as en la nordokcidenta parto de Albanio, c'e Adriatika marbordo. Lezha (Lissus) konsistigas la grupon de praaj urboj de nia lando. G'i estas fondita en la jaro 385 antau' la nova erao. La konturoj de la urbo, konstruita je formo de bela amfiteatro vidanta al Adriatika maro, estas konservitaj hodiau per la c'irkau'igaj muregoj kaj legendeca kastelo.

Tro privilegiita pro g'ia geografia pozicio kaj belecoj raraj: pro la maro akviganta g'in lau'longe de 28 km da marbordo kaj marhaveno kiu estas malfermig'onta baldau', la marhaveno de Shen Gjini; pro la rivero Drin traieranta g'in de norda g'is la suda parto de la urbo; pro fertilaj agrokampoj kiel tiu de Bregu i Matit kaj Zadrime; pro multaj naturaj ric'ecoj subteraj kaj aliaj resursoj kiuj atendas ilian ekspluatig'on; pro belaj montetoj kiel kameloj, s'ajnantaj karavanon en eterna vojag'o kaj pro fiera Vela. G'i estas nomita

de venecianoj 570 jaroj antaŭe kiel “ la dekstra okulo de Durres” (dexter oculus Durrachi). Lezha estas unu el la plej interesaj distriktoj de Albanio.

Hodiaŭ la distrikto de Lezha nombras log'antaron je 90 000 personoj, el kiuj 25 000- 30 000 log'as en la urbo de Lezha, c'irkau' 4000 en Shen Gjirin kaj la cetero en kamparo. Post la demokratiecaj s'ang'ig'o'j Lezha estas travivinta eksterordinaran flukson de alvenantoj, c'efe de nordorientaj areoj, kiuj tiel ekg'uis la liberan movig'on de la homoj, sed ne la eblecon de normala establig'o.

Unuafoje g'i estas menciita en la jaro 833 antaŭ la nova erao . G'ian plej altan evoluon estas atingita dum la dua duono de III jarcento kaj komencig'o de II jarcento antaŭ la nova erao kiam g'i ekcirkuladis la monerojn el bronzo. Estis nomita Lissus kaj komencis sian civitana vivon en la praa mezepoko (XIII jarcento). G'is la jaro 1398 Lissus estis posedaj'o de familio de Dukagjinoj kiuj poste tiuj c'i enmanigis g'in al venecianoj. En Lissus estas okazinta la fama Kunveno de Lezhe, kaj tie mortis kaj entombig'is Skanderbeg.

La urbo estas trafita multfoje de tertremoj, inter kiuj la plej forta estis tiu de la jaro 1979, detruinta la alnovajn kvartalojn.. Hodiaŭ Lezhe estas industria centro (nutraj' kaj malpeza industrio).

Lezha estas tre grava nodo de au'tomobilista kaj fervoja komunikacio. Hodiaŭ s'i similas al granda konstruejo. La memorigilo dedic'ita al nia nacia heroo , la legendeca kastelo kaj la obelisko de la J'urligo pligravigas tiun urbon. G'i havas reton komercan kaj komunecan pli kaj pli kreskig'anta kaj disvolvig'anta. G'i havas kvar eldonejoj, du TV centroj, objektoj de kulto kiel kirkoj kaj moskeoj, sportklubo, kulturcentroj, regiona hospitalo ktp.

Shkoder

1 Hotelo” Rozafat” trovig'as centre de la urbo kaj enhavas 91 c'ambroj, du mang'ejoj, kafeterion, suvenirbutikon. La prezoj varias de 10 USD po persono po tranokto sen matemang'o g'is 15-20 USD kun matenmang'o. La c'ambroj kostantaj 20 USD havas ankau' banejon kaj dus'ejon ene.

2. Hotel “Argent” trovig'as en la enirejo de la urbo . Estas g'i nova hotelo kaj enhavas 34 c'ambroj, kie gepara c'ambro kostas 20 USD . Por unulita c'ambro same la prezo estas 20 USD. La prezo inkluzivas ankau' la matenmang'on. La c'ambroj estas ekipitaj per TV, kondic'ita aerumigilo, necesejo kaj dus'ejo.

3 Hotel” Koloseo” estas nuntempe la plej bona en la urbo de Shkoder. Nova domo kun c'iu'j necesaj kondic'o'j. Unu tranokto en g'i kostas 50 USD po persono.

La insulo de Lezha

Malmulte da fremduloj ripozas en tiu hotelo c'ar en g'i ne estas multe da c'ambroj kun dus'ejo kaj necesejo. La c'ambroj estas ekipitaj per malnovaj mebloj , kvankam fascinaj. La hotelo estas frekventata de fremduloj pro la mang'o kiu g'enerale estas tre bongusta. La hotelo havas du mang'ejoj kie estas eksponitaj diversaj specoj de

c'asbirdoj. La pli malnova au'lo estas pli komforta kaj kun pli bonstataj mebloj. La kuirejo de la restoracio pretigas fis'on, c'asviandon samkiel karakterizajn mang'aj'ojn el Lezha.

Post ripozo en la hotelo vi povas promeni piedmars'ante au' parte au'te g'is la marbordo de kie vi ekg'uos vidaj'on tre belan de la maro, herbaro kaj multaj birdoj kaj bestoj.

La insulo de Lezha sin distingas pro g'ia historio. Dum mezepoko g'i nomig'is la insulo de Mede. En la jaro 1501 Gjergj Kastriot la juna, nepo de Skanderbeg revenis el Italio kaj starigis sian tendaron c'i tie por komenci ribelon. Dum la osmana jugo tiu zono estis forlasita de log'antaro, sed relog'ig'is en XVIII-XIX jarcentoj danke al la alveno de montaranoj el regiono sur Shkoder (Mbishkodra).

La plag'o de Shen Gjin

Trovig'as nordokcidente de Lezhe. Plejparte dumvoje vi estas akompanata de lagunoj (plej granda el kiuj estas Kenadha, pli ol 20 m profunda), aliflanke la krutaj deklivoj de la monteto de Renc.

En Shen Gjin okulfrapas la vastaj surfacoj kovritaj per sablo konsistigantaj grandan plag'on je larg'eco je 150-200 m kaj kelkaj kilometroj longa. La plag'o konsistas el subtila kaj pura sablo ne ekspluatita en g'ia plejparto. Tie 140-150 tagoj havas averag'an temperaturon pli ol 20 °C.

Trans la marhaveno de Shen Gjin la strando anstatau'ig'as de s'tonega marbordo plene de intimaj kas'anguloj kaj medioj.

La urbo de Shen Gjin konsistas el 4000 log'antoj kaj estas lokita c'e la piedoj de la monteto. G'i estas marhavena kaj fis'kaptada centro. Estas praa log'loko je nomo Nimfeum samtempa kun Lissus.

Unu el la plej belaj surprizoj de la marbordo de Lezha estas la sabla insulo de Kuna je 125 ha, etendig'anta dekstre de la delto de Drin. Sude la insulo limig'as kun la laguno de Merxhan (Merdj'an) kaj la marc'ejo ligita per naturaj kanaloj.

La insulo de Kuna mem estas kovrita de bela mediteranea arbaro kun makioj kaj altaj arboj. Inter ili interplektig'as lianoj kiuj malfaciligas la pasig'on. Tiu insulo estas deklarita nacia rezervejo kaj natura monumento. Estas en g'i tre disvastigataj la akvaj birdoj, reptiloj kaj kelkaj mamuloj.

Sude de la insulo de Kuna etendig'as tute virgaj plag'oj c'irkau'itaj de herbaro kaj ric'aj fau'no kaj flau'ro.

Fjoralba Ceno